

1985 januaro
78a jaro
n-ro 950 (1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



**Kun juneca vervo
al 1985
Internacia Junulara Jaro**

Vi trovos,

ke nova jarkolekto komenciĝis. Nova jaro signifas novan aktivadon, kaj la diverseco de la Esperanto-movado certe proponas sufiĉe da agadeblecoj por plaĉi al preskaŭ ĉiu. Daŭra fenomeno dum la historio de UEA estas tio, ke aliĝas al ĝi multaj novaj membroj, kiuj post nur unujara membreco malaperas. Ili ne trovis sian lokon. Ĉiu devus tion povi trovi en movado, kiu ofte uzas la devizon "Unueco en diverseco". La pli spertaj esperantistoj devas gvidi la novulojn ne nur en la lingvon, sed ankaŭ orientiĝi en la movado mem. Ĉi tiu numero de la revuo verŝajne estos la unua, kiun ricevos multaj novaj membroj. Al ili tute apartan bonvenon, kaj al ĉiuj feliĉan kaj agadplenan Novjaron.

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA: Konstruu kun ni fortan movadon por Esperanto (Grégoire Maertens)
- 2 Belartaj Konkursoj 1985: Por turniri en arto (Baldur Ragnarsson); "Amikeco trans limoj"
- 3 Fondaĵo Grabowski: Por sproni la kulturan agadon
- 4 Regiona agado: Pri balkana kunlaboro (Mustafa Resulović); Eksteraj rilatoj: Unesko-movado kongresis
- 5 Kulturo: Dua Pariza Festivalo (G. Sutton kaj S. MacGill)
- 7 Informado: Dokumenta televida filmo (Dončov Hitrov); Aplikado de Esperanto: Jubileo de Radio Pekino (Esperanto-Sekcio de Radio Pekino)
- 8 Informado: Pri profesoroj kaj poezio (Edwin de Kock)
- 9 Arab-devenaj vortoj
- 10 Reagoj: Fake juĝi la lernilojn; Unua deviga instruado; Por bono aŭ malbono
- 11 Financo: Ĉiu povas helpi (John Rapley); Recenzoj: *Scienca interlingvistika simpozio* red. Ryszard Rokicki (Klaus Schubert); *El Anatol*; *Kvin unuaktaĵoj* de Artur Schnitzler/L. Grimme k.a. (M. Haase); *La robaĵoj* de Umar Kajjam/G. Waringhien (V. Sadler); *Komunlingvaj nomoj de plantoj de nord-okcidenta Eŭropo*, *Provizora privata listo de*, de Wouter Pilger (J. Dagys); *Aforismoj* de Ŝota Rustaveli/Z. Aleksandroviĉ Makaŝvili (W. Auld); *La prezo de la elaĉetado* de Erwin ar Menga (D.B. Gregor)
- 15 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 16 Kalendaro: Renkontiĝoj, kongresoj, seminarioj, kursoj ktp.
- 17 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 18 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA
- 19 Nekrologoj; Anoncetoj
- 20 Esperanto en radio (G. Larglantier)

La kovrilo

(kiun ni, cetere, transprenis de alia periodaĵo) montras grupon da gejunuloj. Tio por memorigi nin (la tutan movadon), ke Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 1985 Internacia Junulara Jaro. Kvankam la gejunuloj en nia bildo aspektas senzorgaj, la hodiaŭa junularo frontas multajn problemojn, kiuj tamen diferencas laŭ la mondoparto. TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) esploras ĉi tiujn problemojn i.a. dum la 41a Internacia Junulara Kongreso en Eringerfeld (FR Germanio).

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, 's Graven-dijkwal 108, 3014 EJ Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 237 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Konstruu kun ni fortan movadon por Esperanto

Dum pluraj lastatempaj jaroj la baza informilo pri Universala Esperanto-Asocio portis la simbolan titolon "Konstruu kun ni". Kvankam la plej nova UEA-varbilo nun nomiĝas "Invito por kunfesti la Jubileon", ni havas apartan kialon reveni ĉi-foje al la titolo "Konstruu kun ni".

Post plurjara planado, meze de 1984 la asocia sidejo – la Domo de UEA en Roterdamo – efektive transformiĝis en konstruejon. La laboroj por aldoni al la Domo tute novan alon, kun ekstra laborspaco de pli ol cent kvadrataj metroj, jam tiel progresis, ke ni nun povas komuniki, ke UEA eniras la novan jaron 1985 kun nova domo. Tiu aldona laborspaco estos uzata por plia vastigo de la servoj de UEA, ne nur al sia membraro sed ankaŭ al la progresigo de la movado por la Internacia Lingvo ĝenerale.

Kvankam tiu konstruado prezentas apartan ŝarĝon por la asocia kapitalo, ĝi tamen samtempe estas plia signo de la materia stabileco de la Asocio, kiu tiel sekurigas sian kapitalon per la investo en valoran nemoveblaĵon, situantan en la centro de la plej granda monda havenurbo – Roterdamo. La Estraro jam havas konkretajn planojn por pliaj rekonstruoj de la Domo (instalo de moderna, strate alirebla librovendejo kun konstanta libroekspozicio, modernigo kaj vastigo de la Biblioteko Hodler, instalo de sonregistrejo, vastigo de la eldonaj kaj grafika fakoj, moderna kunsidejo-prelegejo ktp). Tamen, ni povos realigi ĉion ĉi nur iom-post-iome, laŭ la disponeblo de la financaj rimedoj. Estas ĉi tie notinde, ke la apogo de la membraro estas tre kuraĝiga, ĉar antaŭ ol ni anoncis publike, ke ni havos kelkajn pliajn ĉambrojn, kies nomoj estas simbole aĉeteblaj, – ni jam forvendis kvar el la disponeblaj kvin ĉambronomoj (prezo: po 10 000 guldenoj).

Kiam ni post kelkaj monatoj publikigos la Estraran Raporton pri la jaro 1984, eblos konstati, ke tio estis plurrilate tre signifaj jaro en la vivo de la Asocio. Krom la vastigo de la Domo, tiun jaron aparte markas tre grave vigliĝo de la eldona agado, kiu surmerkatis tutan aron da signifaj verkoj. Inter ili elstaras la impona eldono de *Esperanto antologio*, kiu digne inaŭguras la specialan serion sub la nomo Jubilea Kolekto: Jarcento de Esperanto. La merkato entuziasme akceptis ankaŭ la unuan grandan volumon sub la signo de Scienca Eldona Centro de UEA en Buda-

peŝto – *Ĉu vi konas la Teron?* – kaj la plej novan verkon de d-rino Marjorie Boulton – *Faktoj kaj fantazioj*. Karakteriza por 1984 estis ankaŭ la sukcesa okazigo de la 69a Universala Kongreso en nova mondparto, en Kanado.

Kion portos al ni 1985? Ni espereble havos tradicie grandan Universalan Kongreson meze de Eŭropo – en Aŭgsburgo. Unu el la tagordaj punktoj, kiujn la Komitato de UEA traktos tie, povus montriĝi aparte signifa por la estonta evoluo de nia Asocio. Temas pri la planoj malfermi la asocian membrecon al tute nova tavolo de la esperantistaro, al tiuj, kiuj pro financaj kialoj ĝis nun ne sukcesis ligi sin al UEA. Se la Komitato aprobos tiurilatajn planojn de la Estraro, ni povas antaŭvidi, ke la Asocio renkontos la Centjaran Jubileon, kun pliaj miloj da membroj, pli ol ĝi iam ajn antaŭe havis. Ni planas ankaŭ funde revizii la rilatojn inter UEA kaj la aliĝintaj landaj asocioj, tiel ke tiuj rilatoj ne limiĝu al formularoj kaj kotiztranspagoj, sed ke UEA helpu kiom eblas ankaŭ en la solvado de problemoj, kiuj frontas unuopaj landaj organizaĵoj. Konkrete parolante, ni intencas entrepreni ankaŭ kun aliaj landaj asocioj paŝojn similajn al tiuj jam realigitajn en la kunlaboro kun Ĉina Esperanto-Ligo, kiu dum 1984 reprenis por la enlanda uzo, kun permeso de UEA, la verkojn *Plena analiza gramatiko* kaj *Esperanta antologio*, kiuj alimaniere neniam sukcesus atingi la ĉinan esperantistaron.

Iasence, eble la plej grava novaĵo, kies realigon ni povas atendi dum la venontaj jaroj, estis legebla en la ĵusa, decembra, numero de la revuo *Esperanto*. Ni parolas pri la kelkpaĝa anonco de la nederlanda firmao BSO, kiu dum 1985 dungos plurajn specialistojn pri Esperanto, por daŭrigi sian projekton pri la utiligo de la Internacia Lingvo en la aŭtomata tradukado. Malantaŭ tiu pionira projekto nun ne plu staras nur la menciita firmao sed ankaŭ la nederlanda registaro, kiu decidis financi la entreprenon.

Ni do povas atendi signifan progreson sur pluraj kampoj de la agado por la Internacia Lingvo dum la jaro 1985. Eĉ pli bone ol "atendi" tiun progreson, ni ĉiuj povas kontribui al ĝi, ni ĉiuj povas labori por ke ĝi realiĝu. La preparoj por la Centjara Jubileo en 1987, kaj UEA kiel la ĉefa portanto de tiuj preparoj, meritigas la maksimuman atenton de ĉiu unuopa partoprenanto en la tutmonda Esperanto-movado.

Ni havu prosperan kaj atingoriĉan 1985, kun aparta konsidero, ke ĝi estas Internacia Junulara Jaro, kaj ke necesas repruvi la junecon kaj la vigecon de la Movado sojle de nia centjariĝo!

Grégoire Maertens,
Prezidanto de UEA

Por turniri en arto

Rajtas konkursi ĉiu esperantisto, kiu ne gajnis dum la tri tuj antaŭaj jaroj unuan premion en la branĉo, por kiu li aŭ ŝi konkuras. Unu persono povas partopreni per maksimume tri verkoj en ĉiu literatura branĉo.

Poezio: Sen fiksitaj maksimuma longo de konkursaĵo. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo de konkursaĵoj 200×65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma ludodaŭro 25 minutoj. Tri premioj.

Eseo: Temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia prefere en ligo kun la Internacia Lingvo. Longo ĉ. 400×65 tajpospacoj. Unu premio (Premio Luigi Minnaja).

Kanto: La teksto kaj melodio devas esti novaj kaj ankoraŭ ne publikigitaj, kiel ankaŭ verkitaj de malsamaj aŭtoroj. La kanto premiita estu publike prezentita, se eble en la koncerna Universala Kongreso. Unu premio (Premio An-okin pri Kanto).

Infanlibro de la Jaro: Oni rajtas proponi ĉiujn infanlibrojn, kiuj aperis dum la jaro 1984, originalajn kaj tradukitajn. Unu premio.

Fotografio: Minimuma formato 13×18 cm. Fotoj povas esti nigra-blankaj aŭ koloraj. Tri premioj.

La konkursaĵoj en la branĉoj poezia, proza, teatraĵa kaj kanta devas esti senditaj en kvar ekzempleroj al la adreso de la sekretario de la Belartaj Konkursoj: s-ro Alec Venture, 22A Grosvenor Road, Warrington, Surrey SM6 0EF, Britio, kaj devas atingi lin plej malfrue la 31an de marto 1985. Por la branĉo "Infanlibro de la Jaro" oni sendu tri ekzemplerojn de la koncerna libro al la adreso de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, same ĝis la 31a de marto 1985. En la branĉo fotografio sufiĉas sendi unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo al: Loka Kongresa Komitato de la 70a UK de Esperanto, Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg, FR Germanio, tiel ke la sendaĵo atingu tiun adreson antaŭ la 1-a de julio 1985.

La konkursaĵoj (escepte de la infanlibroj) devas esti signitaj per pseŭdonimo; en aparta koverto estu indiko de tiu pseŭdonimo kun nomo kaj adreso de la konkursanto. Se tion permesas la poŝtaj reguloj de la koncerna lando, oni aldonu po kvin ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkuras. Sur ĉiuj konkursaĵoj estu klare indikita la konkursa branĉo.

Baldur Ragnarsson,
prezidanto de la Belartaj Konkursoj



Jen la foto István Nemere, verkisto de Zoltán Fejér (Hungario), kiu gajnis, kune kun du aliaj portretoj de la sama fotisto, la Unuan Premion en la Belartaj Konkursoj de la pasinta jaro. István Nemere estas unu el la plej produktivaj kaj rimarkindaj Esperantaj verkistoj de la lastaj jaroj. Dum relative mallonga tempo aperis de lia plumo La naŭa kanalo (1982), La fermita urbo (1982), La blinda birdo (1983) kaj Sur kampo granita (1983). Karakterizaĵo de la verkoj de Nemere estas ilia elstara parola stilo.

"Amikeco trans limoj"

La 16a Semajno de Internacia Amikeco estos la lasta plena semajno de februaro, do de la 17a ĝis la 25a.

La celo de la Semajno de Internacia Amikeco estas festi homajn kontaktojn trans naciaj limoj per Esperanto kaj krei komunan tradicion, kiun povas partopreni ankaŭ neesperantistoj. La Semajno kreiĝis en la espero, ke oni ekster la Esperanto-movado uzos ĝin por konsciigi pri la intimaj rilatoj inter internaciaj lingvo kaj amikeco.

La okazo donas apartan eblecon intense informi pri Esperanto kaj ties rolo en forigo de kultura kaj lingva diskriminacio sub la devizo de la Semajno "Amikeco trans limoj". Unu el la ĉi-rilate ofte uzataj informmetodoj estas aranĝo de komuna kunveno kun alimovada societo.

Por stimuli la kulturan agadon

Sen granda bruo, dum la Universala Kongreso en Vankuvero, unuafoje anonciĝis la plej grandaj mon-premioj, kiuj ekzistas en la Esperanto-movado. Temas pri la nova Fondaĵo Antoni Grabowski, iniciatita antaŭ du jaroj (vidu ĝian regularon en nia numero de februaro 1983, p.26, kaj la detalojn pri la unuaj premioj en la numero de septembro 1984, p.153).

La iniciatinto kaj la ĉefa mecenato de la Fondaĵo, s-ro Adam Goralski Pawlikovski (Kanariaj Insuloj, Hispanio), mem kontribuis ĝis nun al la kapitalo de la Fondaĵo la sumon de 13 750 usonaj dolaroj. En antaŭ nelonge ricevita letero al UEA, kiu administras la Fondaĵon, s-ro Goralski promesas baldaŭ fari plian kontribuaĵon, por rondigi sian donacon je 15 000 dolaroj. Tiun leteron akompanis ankaŭ ĝenerala alvoko por finance subteni la Fondaĵon, kun la strebo, ke ĝia kapitalo kresku ĝis tuta kvindeko da miloj da dolaroj.

Ni devas konfesi, ke ni en la redakcio ne tre entuziasmis pri tia alvoko, ĉar ni konscias, same bone kiel vi, ke al la esperantistaro ne mankas similaj alvokoj por kontribui al la plej diversaj fondaĵoj, projektoj kaj entreprenoj. Tamen, dum la lastaj monatoj, s-ro Goralski pravas al ni, en la plej praktike imagebla maniero, ke nia skeptikeco estas malĝusta. Li mem komencis varbi kontribuaĵojn al la Fondaĵo, kaj la listo de la donacantoj (vidu ĉi-kune) preskaŭ ĉiutage grandiĝas. Kvankam la sumo de la unuaj premioj konsumis pli ol 1 500 dolarojn, la kapitalo de la Fondaĵo kreskis, i.a. ankaŭ pro la interezo, kiu en 1983 sumiĝis je pli ol 1 300 dolaroj.

S-ro Goralski planis dividi la celatan sumon de 50 000 dolaroj je mil "kuponoj" de po 50 dolaroj. Li mem ĝis nun aĉetis 275 tiajn kuponojn, kaj la aliaj donacintoj konsumis 42. Restas do 683 disponeblaj kuponoj de po 50 dolaroj.

La iniciatinto de la Fondaĵo kredas – kaj per propra varbado montras –, ke lia plano estas efektivebla. Li prave atentigas, ke oni ne devas limigi la varbadon de la kontribuaĵoj nur al la Movado, ĉar multaj komercaj kaj industriaj firmaoj havas specialajn rimedojn por donaci ĝuste por tiaj celoj, kiajn antaŭ si metas Fondaĵo Antoni Grabowski. Kiel la apuda donacolisto montras, ne nur unuopuloj sed ankaŭ lokaj kaj regionaj Esperanto-organizaĵoj povas kunhelpi en la realigado de ĉi tiu ambicia projekto, kiu portas la nomon de la granda Esperanta pioniro.

Kvankam la kapitalo de la Fondaĵo estas administrata (kaj deponita en banko) en usonaj dolaroj, oni kompreneble povas direkti siajn kontribuaĵojn al la Centra Oficejo de UEA ankaŭ en aliaj konverteblaj valutoj, kun nepra mencio, ke temas pri Fondaĵo Antoni Grabowski.

Donacoj al Fondaĵo Grabowski

Adam Goralski, Kanarioj, Hispanio	US\$ 13 750
Juan Régulo Pérez, Kanarioj, Hispanio	100
Pola Esperanto-Asocio, Filio Varsovio	100
Pola Esperanto-Asocio, Filio Vroclavo	50
Pola Esperanto-Asocio, Filio Poznano	50
K. Goralski Krause, Kanarioj, Hispanio	100
E-Societo Tenerife, Kanarioj, Hispanio	50
Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj	50
S. Goralski Filonov, Kanarioj, Hispanio	100
Roman Turowski, Venezuelo	100
Jadwig de Santiago, Venezuelo	200
Joseito Mateos, Venezuelo	100
Alfred Gonzeth, FR Germanio	100
Astura Esperanto-Asocio, Hispanio	50
David Valecillos, Venezuelo	100
German Montero, Venezuelo	100
Alejandra Krause, Venezuelo	750



Adam Goralski (meze, kun okulvitroj, tiu al kiu oni donas la mikrofonaĵon) dum la Kongreso en Budapeŝto: Mecenato kun grandaj planoj kaj admirinda agadkapablo.

(Foto: Z. Fejér)

Pri balkana kunlaboro

Pri kongresoj oni skribas raporton por unu tago, memoroj estas daŭraj. Tio validas ankaŭ por la 2a Balkana Esperanto-Kongreso, kiu okazis en Ateno, Greklando, de la 20a ĝis la 25a de oktobro, kun partopreno de ĉ. 260 personoj. La kongresa temo estis "Esperanto kiel rimedo por alproksimigi la balkanajn popolojn".

En la solena malfermo la urbestro de Ateno, s-ro Dimitrios Veis, protektanto de la kongreso, alparolis la kongresanojn.

Apartaj temoj diskutitaj en la kongreso, organizita de Helena Esperanto-Asocio, estis la kontribuo de la Esperanto-movado al balkana kunlaboro, la Centjara Jubileo de Esperanto kaj aktivigo de la kultura kaj instrua laboro.

En la kongresa rezolucio oni konstatis interalie, ke Esperanto povas ludi rolon en la daŭrigo kaj firmigo de la balkana kunlaborado precipe en la ĉiutagaj



Maria Pontika, prezidantino de Helena Esperanto-Asocio, kaj Dimitar Papazov, sekretario de Bulgara Esperantista Asocio, diskutas ĉe la ruinoj de Delfo.

kontaktoj. Rilate la edukan, kulturen kaj sciencan terenojn, oni rekomendis al balkanaj Esperanto-organizoj plani kaj firmigi kunlaboradon cele al la plej efika pritraktado de la komunaj intereso.

Oni decidis okazigi balkanan Esperanto-kongreson ĉiujare kaj starigi Balkanan Esperantistan

Kunordigan Komitaton, konsistantan el oficialaj reprezentantoj de balkanaj Esperanto-organizoj, kiuj estas aliĝintaj al UEA.

La balkana Esperanto-kunlaboro komenciĝis jam en 1909. En la dua duono de la pasinta jarcento, kiam aperis Esperanto, por la eŭropa kaj precipe balkana situacio estis karakterizaj vekiĝo de la nacia konscio kaj fortigo de streboj realigi naciajn rajtojn kaj liberecojn. En tiu kunteksto des pli reliefigis la naciaj lingvoj kaj kulturoj. Post tiu tempo la politika mapo de Balkanio multe ŝanĝiĝis. La produktivaj fortoj kaj la tuta socia evoluo neeviteble celis al integriĝo kaj kunlaboro inter la popoloj kaj ŝtatoj, tamen sur la nova bazo de egaleco kaj egalrajteco. En tiuj tre komplikaj cirkonstancoj la problemo de la lingvo kiel ilo por internacia interkompreniĝo kaj kunlaboro fariĝis tre aktuala kaj akuta. En Balkanio ekzistas eksterordinara diverseco etna, lingva, kultura, religia, ekonomia ktp., tiel ke la ideoj de la Esperanto-movado relative rapide disvastiĝis en Balkanio. Bedaŭrinde, sub la influo de eksterbalkanaj potencoj kaj el la komplikaj regionaj cirkonstancoj devenis "barelo da pulvo", kaj la vorto "balkanigo" fariĝis sinonimo de dispecigo, malunueco kaj netoleremo.

Hodiaŭ, en la kadro de klopodoj fortigi la eŭropajn sekurecon kaj kunlaboron ankaŭ en Balkanio la situacio pozitive ŝanĝiĝis. La plifortigo de la naciaj Esperanto-movadoj estas kondiĉo por la progreso de la Esperanto-movado en ĉiuj balkanaj landoj.

Mustafa Resulović

EKSTERAJ RILATOJ

Unesko-movado kongresis

Oni ne malofte petas konkretajn konsilojn, kiel efike kaj praktike labori por Esperanto. Unu tia kvaŭzaŭ preta ebleco estas kunlabori en sia loka Unesko-klubo aŭ -asocio. Necesas, ke ni influu Uneskon ankaŭ demalsupre. Oni ĉi-rilate povas memori la rezolucion de la 27a Pleno de Monda Federacio de Asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj (do aparta de la nova federacio, kiu subtenas Uneskon), kiu en 1979 "... invitis ĉiujn Asociojn pri UN kunlabori kun Esperanto-asocioj pri instigoj al edukaj instancoj kaj organizaĵoj en siaj landoj enkonduki aŭ plivastigi la instruadon de Esperanto." Tiaj rezultoj estas atingeblaj de aktivuloj kaj ĉiam utiligeblaj, por intensigi la por ambaŭ organizaĵoj gravan kunlaboron.

De la 16a ĝis la 24a de julio pasintjare okazis en Japanio la unua Monda Kongreso de Unesko-Klubo kaj -Asocioj. La unuaj du tagoj estis por la ĝenerala



De maldekstre: S-ino M'Bow, s-ro Amadou Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko, kaj s-ino Kikusima, kiu reprezentis UEA ĉe la kongreso.

kunveno de Monda Federacio de Unesko-Klubo kaj -Asocioj, fondita en 1981 por plivigli la neregistaran Unesko-movadon. Post malfermo en la urbo Sendai, la kongreso migris al Kôbe, Hiroŝimo kaj Tokio, kun la temo "Paco – evoluigo – partopreno".

El ekster Japanio venis 222 reprezentantoj de 74 organizaĵoj de la neregistara Unesko-movado el 72 landoj (en la Monda Federacio troviĝas ĉ. 2 500 organizaĵoj en ĉ. 80 landoj) plus i.a. funkciuloj de Unesko kaj 27 reprezentantoj-observantoj de internaciaj neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko. La reprezentanto-observanto por UEA estis s-ino Kazuko Kikusima. La letera saluto al la kongreso de d-ro Humphrey Tonkin, estrarano de UEA i.a. por rilatoj kun UN, aperos en la fina raporto de la kongreso.

La ĝeneralaj kunsidoj, prelegoj kaj grandaj fakaj kunvenoj, kiuj traktis pacon kaj reduktadon de armiloj, evoluigon kaj la nordo-sudan problemon, evoluigon kaj la medion, evoluigon kaj edukadon ks., ĝuis servon de samtempa interpretado inter la franca, angla kaj japana, sed malgrandaj laborgrupoj okazis sen interpreto en la angla aŭ franca.

Ĉar la kongreso estis la unua de sia speco, parolrajtigitoj konkuris por prezenti sian agadon. Tiuj mallongaj prezentoj tamen komprenigis, ke estas malmulte da veraj internaciaj kunlaboroj. Alie montriĝis, ke la neregistara Unesko-movado en ekonomie evoluintaj landoj tendencas okupiĝi pri internaciaj amikeco, interŝanĝoj kaj paco, dum en evolulandoj ĝi okupiĝas pri pli efika agrikulturo, handikapuloj, analfabetoj ks.

La unuan tagon de la kongreso partoprenis s-ro Amadou Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko. En interparolo kun s-ino Kikusima, s-ro M'Bow esprimis sian ĝojon, ke UEA interesiĝas pri la kongreso, ĉar por li la lingva problemo de la mondo

ĉiam estas grava temo, pro kio li atente observas la agadon por Esperanto. Li aparte interesiĝis pri la laboro en Ĉinio kaj aliaj evoluantaj landoj. Aŭdinte, ke Japana Esperanto-Instituto eldonis japanlingvan broŝuron *Esperanto en Unesko* kaj ke ĝia ĉefa enhavo estas resumo de lia prelego en la 62a Universala Kongreso de Esperanto, li tre deziris ekzempleron. La postan tagon oni liveris ĝin al li kun ekzemplero de la libro *Loulan*, lastatempe tradukita el la japana en Esperanton por Serio Oriento-Okcidento. La broŝuro estis ankaŭ libere prenebla de kongresanoj en ĉiuj kvar urboj.

La nova prezidanto de Monda Federacio de Unesko-Klubo kaj -Asocioj estas s-ro Gonzalo Abad el Ekvadoro. La federacio de nun kongresos en ĉiu tria jaro, do venontfoje en 1987, kvankam la lokon oni ankoraŭ ne decidis.

KULTURO

Dua Pariza Festivalo

Sekve de la pasintjara sukceso, Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) okazigis sian duan Esperantan teatron kaj kanzonan festivalon en Parizo je la 24a kaj 25a de novembro. Oni ofertis kvar teatraĵojn de du teatraj grupoj, kabaredon, varian muzik- kaj deklamvesperon kaj prezentadon de kvin kanzonistoj, kvankam nur du kaj duono fakte aperis.

Estas malfacile diri precize kiom da personoj partoprenis la festivalon, ĉar oni rajtis aĉeti bileton por unuopa programero. Tamen, ne pli ol po 80 homoj ĉeestis ĉiun prezentadon, kio indikas ioman falon kompare kun la pasintjara nombro de spektantoj.

Antaŭ la komenco de la festivalo la loka pariza radiostacio Radio 3 faris ampleksan intervjuon kun Jean-Pierre Danvy, la juna vicprezidanto de UFE.

La du kanzonistoj, kiuj alvenis kun gitaro en la mano, estis Suzanna el Italio kaj Ĵak Le Puil el Parizo – ambaŭ bone konataj artistoj en Esperantaj scenejoj kaj kasetoj. La elekto de kantoj variis de amaj aŭ amuzaj ĝis socikritikaj, de tradukitaj ĝis originalaj. Certe la plimulto de la publiko trovis ion atentokaptan, kvankam oni ekmemoris – kiel ĉe ĉiuj aliaj prezentadoj –, ke temas pri festivalo de amatoroj. Suzanna kantis kanzonon nove komponitan de William Auld. Bedaŭrinde ĝi suferis de kelkfoje neklara elkanto. La duona kanzonisto estis Serĝo, "lastmomenta truŝtopulo". Lia brila pianludado faris bonvenan paŭzon en la sameca kanzonado.

La vigla kaj entuziasma Zagreba Teatro-Grupo prezentis "Sonoriloj" de Smljan Rozman kaj "Stilaj ekzercoj" de R. Queneau, adaptitan de Pajo Tišljarić. La moderna abstrakteco de "Sonoriloj" ne plaĉis al ĉiuj. Foje ĉirkaŭflosis kelkaj lozaj akuzativoj, kaj

necesis jen kaj jen iom da suflorado. Tamen, la teatraĵo portis klaran mesaĝon: se oni ne agas laŭ la propra konscienco, sed senkritike akceptas dogmon desupre venantan, la konsekvencoj iĝas negativaj por la subuloj kiel ankaŭ por la regantoj. "Stilaj ekzercoj" traktis diversstile simplan okazaĵon, ligitan al la Esperanto-movado. Ĝi foje amuzis, foje provis satiri, sed ne tre sukcese, verŝajne pro nesufiĉa scio pri la celitoj.

La teatra grupo Esperanto de Parizo prezentis "Eduardo kaj Agripino" kaj "La forpasinto", ambaŭ de R. de Obaldia kaj tradukitajn de Georges Lagrange. Estis malfacile trovi en la teatraĵoj ian gravan mesaĝon, sed ili ambaŭ sukcesis amuzi la publikon, spite al nebuliga rolo de fortega nacia akcento de unu aktoro. Aliflanke la du teatraĵoj entenis la plej talentan aktoradon de la festivalo, kvankam foje mankis al la amuzo sufiĉe da seriozo por plentrafi la amuzigan celon.

La muzika vespero komenciĝis per pianludado kaj dancado, akompanata de deklamado. Ne helpis, ke la deklamado enhavis lingvajn erarojn. La ĉefan parton de la vespero plenumis la skandinava rokmuzika grupo Amplifiki, kiu plej bone el ĉiuj sukcesis entuziasmigi la spektantojn. Iliaj konataj "Kafo kaj te" kaj "Sola" troviĝis inter multa nova materialo: la grupo verkas la proprajn tekstojn. En Parizo la muzika kaj podia prezento estis pli disciplinita ol ĝi kutime estas antaŭ nur juna publiko, ekzemple en Internacia Junulara Kongreso.

En libro la enhavtabelo kutime troviĝas komence. En Parizo ni ĝuis ĝin fine, en la prizorgo de la kabarista grupo "Ruza Kruĉo". Ĝi parodiis sinsekve ĉiujn erojn de la semajnfino, kaj tion faris pli koncize kaj kohera ol antaŭ unu jaro. Granda parto de la prezento evidente fontis el last-sekunda komuna inspiro. La amplifika trinkokanto elvokis parodion "Vodko kaj viski", dum la koreografio de kruĉano Septier pri la nokta papilio vivos en la memoro pli longe ol la originalo.

Oni povas bedaŭri, ke oni ne inkluzivis almenaŭ unu tute originale verkitan teatraĵon. Tiom da ili restas neluditaj. Krome, voĉartistoj ŝuldas al sia publiko trejnitan voĉon, do ne devus esti tro malfacile fortreni la nacian akcenton, per kiu kelkaj francaj prezentantoj igis sin foje eĉ nekompreneblaj.

Espereble UFE trovos eblecon okazigi trian festivalon en la venonta jaro. Artistoj atentu tiun okazon prezenti. Al la nuna festivalo venis esperantistoj el ĉiuj landoj plej proksimaj al Parizo kun la escepto de Britio, spite al tio, ke Britio estas pli proksima ol ekzemple Nederlando.

La informa valoro de ĉi tia festivalo povas esti aparte granda, ĉar ĉiu ligo inter kulturo kaj Esperanto en la mensoj de la ekstera publiko helpas la prestiĝon de la lingvo. Tuj post la semajnfino UEA elsendis bultenon de sia Internacia Gazetara Servo en la franca, angla kaj Esperanto.

Geoffrey Sutton kaj Stefan MacGill



Vigla sceno ĉe la tombo en la teatraĵo La forpasinto de R. de Obaldia.

Dokumenta televida filmo

La studio por televidaj filmoj Ekran en Sofio kreis 25-minutan 16mm-an koloran filmon, kiu titoliĝas *Leciono de Esperanto*. Tio estas la unua bulgara profesia filmo, kies ĉefa temo estas la disvastigo kaj atingiĝoj de la Internacia Lingvo en Bulgario ekde la unuaj jaroj de la jarcento ĝis hodiaŭ.

La filmo tre lerte konigas al la granda neesperantista publiko interesajn, malmulte konatajn faktojn kaj personojn el la historio de la bulgara Esperanto-movado: la unuajn pionirojn Miloslav Bogdanov, Hristo Popov, iliajn lernolibrojn kaj ĉefajn verkojn pri kaj en Esperanto. Sur la ekrano aperas multaj elstaraj bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj, kiuj parolas pri Esperanto kaj pri sia propra aktivado: la veterano Nikola Aleksiev, Esperanto-poetoj Asen Grigorov kaj Penka Batoeva, aktoro Nikolaj Binev, prof. Humphrey Tonkin (Usono), d-ro Renato Corsetti (Italio) k.a.

Por montri kaj pruvi la internaciecon de Esperanto la aŭtoroj filmis en 1983 momentojn el la 68a UK de Esperanto en Budapeŝto, unu el la plej amase vizititaj en la preskaŭ centjara historio de la monda Esperanto-movado.

La eŝo ĉe la publiko estas tre vigla kaj granda. Multajn laŭdajn leterojn ricevis Bulgara Televido kaj la Centra Oficejo de Bulgara Esperantista Asocio. Tio ja pravas la grandan intereson, kiun la filmo vekis, kaj kuraĝigas la filmagantojn serĉi novajn temojn pri Esperanto.

Donĉo Hitrov

APLIKADO DE ESPERANTO

Jubileo de Radio Pekino

Radio Pekino komencis elsendi programojn en Esperanto antaŭ 20 jaroj, ekde la 19a de decembro 1964. Komence la elsendo okazis dufoje ĉiusemajne po duonhoro kaj direktiĝis nur al Eŭropo. Kelkajn monatojn poste, en aprilo 1965, oni direktis ĝin ankaŭ al Japanio, Koreio kaj sudorienta Azio. Tiu stato daŭris ĉirkaŭ 15 jarojn, sed fine de oktobro 1979 la elsendo de du fojoj en semajno ŝanĝiĝis en ĉiutagan. Gesamideanoj en pli ol 40 landoj de Azio, Eŭropo, Oceanio kaj ankaŭ aliaj kontinentoj povis kapti ĝin. Unu jaron poste, en la fino de oktobro 1980, ĝi komencis direktiĝi ankaŭ al Latin-Ameriko. Ekde tiam esperantistoj en pli ol 50 landoj de Azio,



Parolistoj ĉe la mikrofono en la studio de Esperanto-Sekcio de Radio Pekino.

Eŭropo, Oceanio, Latin-Ameriko, Nord-Ameriko kaj eĉ Afriko aŭskultas la Esperantan disaŭdigon de Radio Pekino.

Nun elsendo okazas ĉiutage kvar fojojn po duonhoro. La ĉiutaga elsendodaŭro estas sume du horoj, ĉiusemajne 14 horoj kaj ĉiumonate ĉirkaŭ 60 horoj.

La Esperanta elsendo de Radio Pekino celas amikecon kaj interkompreniĝon inter ĉinaj kaj diverslandaj popoloj. La elsendo havas jenajn regulaĵajn programerojn: Novaĵoj, Esperanto en Marŝo, Ĉina Kulturo, Vojaĝo en Ĉinio, Leterkesto, Literaturo kaj Muziko. El tiuj programeroj, diverslandaj aŭskultantoj povas informiĝi pri la aktualaj okazaĵoj en Ĉinio, la sinteno kaj starpunkto de la ĉina registaro pri gravaj internaciaj aferoj, koni Ĉinion kaj la ĉinan popolon, ĝiajn kelkmiljaran historion, kulturon, belan pejzaĝon, disvolviĝantan edukadon, buntan literaturon kaj diversajn artojn, sociajn morojn kaj vivkulturojn de la popoloj de ĉiuj naciecoj de Ĉinio. Krome la servo informas pri la vigla disvolviĝo de la Esperanto-movado en Ĉinio kaj en aliaj landoj de la mondo.

La Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino ĝuas subtenon kaj helpon de aŭskultantoj. Esperantistoj en jam pli ol 50 landoj skribis al ĝi leterojn. Juĝate laŭ la nombro de korespondaĵoj, inter la 38 fremdlingvaj elsendoj kaj kvar dialektaj elsendoj de Radio Pekino la Esperanto-Sekcio okupis la 14an lokon en 1983. Multaj amikoj ne nur mem regule aŭskultas ĝin, sed ankaŭ ofte surbendigas programerojn por poste aŭdigi al aliaj. Nemalmultaj aŭskultantoj fervore propagandas la Esperantan elsendon de Radio Pekino. Ili organizis ekspoziciojn, eldonis afiŝojn ktp. Multaj sendis al ni informojn pri Esperanta aktivado en sia loko, donacis al ni Esperantajn librojn, vortarojn, diskojn, kasetojn, ĉokoladon, diversajn metiartaĵojn, ekzemple pupon, sonorilon, monujon, glason ktp.

La Esperanto-Sekcio de Radio Pekino provas atente respondi leterojn de la alskribintoj, sendas al

ili horaron, raportilon, QSL-karton, flageton, insignon, notlibron kaj aliajn memoraĵojn. Ĉiujare ĝi donacas al ĉiuj alskribintoj novjaran kalendaron. Radio Pekino provas atenti la proponojn kaj dezirojn de la aŭskultantoj. Ekzemple laŭ la propono de finna aŭskultanto Jalmar Vakkari ĝi elsendis prelegserion de ĉinaj naciaj muzikiloj. En la daŭro de ĉirkaŭ ses monatoj ĝi konigis 22 tipajn ĉinajn muzikilojn kaj la komponaĵojn kaj kantojn ludatajn per tiuj instrumentoj.

Kiam aŭskultantoj venas al Pekino la laborantoj de la Esperanto-Sekcio volonte akceptas ilin, akompanas ilin en ekskursoj, gastigas ilin ĉe la radio-studio kaj faras al ili intervjuon. Pere de tiuj kontaktoj plintimiĝis la rilatoj inter Radio Pekino kaj la aŭskultantoj. Reveninte hejmen, nemalmultaj amikoj faris raporton, verkis artikolon, projekciis diapozitivojn por propagandi la Esperantan programon de Radio Pekino.

Universala Kongreso estas grandioza renkontiĝo de diverslandaj esperantistoj. Ekde 1982, Radio Pekino sendas sian raportiston al la kongreso. Tie helpate de UEA kaj la Loka Kongresa Komitato ili kontaktiĝis kun diverslandaj aŭskultantoj kaj gesamideanoj, aktive intervjuis ilin. Tiuj raportoj kaj intervjuoj ĉiam trovis aprobon flanke de la aŭskultantoj.

La Esperanto-Sekcio de Radio Pekino ĉiam klopodas por starigi amikecajn kunlaborajn rilatojn kun kolegoj en alilandaj radiostacioj. Nun ĝi tenas bonajn rilatojn kun Esperanta Redakcio de ORF, tiu de Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako de Radio Zagrebo, Esperanto-redakcio de Radio Pécs.

Lastjare Esperanto-Sekcio de Radio Pekino bone kunlaboris kun la gazeto de UEA/TEJO *Kontakto*. Ĝi regule kontribuis al la gazeto diverstemajn artikolojn. Radio Pekino mem ricevis helpon de nemalmultaj mondaj, landaj, lokaj, grupaj gazetoj aŭ bultenoj, ekzemple *Esperanto*, *Heroldo de Esperanto*, *Revuo Orienta*, *DX-informilo*.

La Esperanta programo en Radio Pekino ĝuas subtenon kaj helpon de la ĉina registaro. La fama veterano Hu Yuzhi, vicprezidanto de Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, siatempe proponis Esperantajn elsendojn de Radio Pekino. Ye Laishi, Chen Yuan, Li Naixi kaj aliaj veteranaj esperantistoj fervore klopodis por la elsendo. Venlo Fon, Zensto, Li Shijun kaj aliaj praktike laboris por la elsendo en ĝiaj komencaj jaroj. Preskaŭ ĉiuj laborantoj de la sekcio estas iliaj lernantoj. Esperanto-Sekcio de Radio Pekino ĉiam tenas intimajn kunlaborajn rilatojn kun Ĉina Esperanto-Ligo, redakcio de *El Popola Ĉinio*, la Esperanto-Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj kaj Ĉina Esperanto-Eldonejo.

Nun en la Esperanto-Sekcio de Radio Pekino laboras sume ok personoj, kvar virinoj kaj kvar viroj.



La Esperanto-Sekcio de Radio Pekino: Hang Chun, Liu Zenfeng, Li Yuping, Nan Yuli, Wang Yuchin, Xie Yuming, Xue Meixian kaj Zhan Xuede.

En la komenca jaro la sekcio havis nur kvin laborantojn. Siatempe ĝia personaro nombris 11 homojn. Nun ĝiaj ok personoj prizorgas ĝian ĉiutagan programon, sed por pli prosperigi la elsendojn, la sekcio decidis varbi novajn pli junajn laborantojn.

Esperanto en radio estas bona komunikilo. Superinte ĉiujn limojn, ĝi semas amikecon en la koroj de diverslandaj popoloj. Ĝuste kun tiu konvinko Radio Pekino uzis Esperanton dum la pasintaj 20 jaroj. Ĝi klopodos plu por tio.

Esperanto-Sekcio de Radio Pekino

INFORMADO

Pri profesoroj kaj poezio

Legintoj de la artikolo "Poezio kiel informilo", kiu aperis en la julia-aŭgusta numero de Esperanto (p. 123), verŝajne scivolas pri la sekvoj de la rakonto pri la profesoro kaj la studento de la angla. Edwin de Kock nomis la epizodojn "neseninstruaj".

Kiel mi promesis, mi havigis al la duopo faldfolion kaj anglajn tradukojn de Esperantaj poemoj (provizoran fasketon komencan por mia projektata antologio de originalaj Esperantaj poemoj kun anglaj proztradukoj, laŭ la modelo de la angla libroserio Penguin Poets).

La faldfolio mencias i.a. tri aferojn, kiuj devus aperi en ĉiu tia eldonaĵo: 1) la fakton pri la ekzisto de

nia ĉefa gloro literatura, nome originala poezio, leginda ĉar jam alte evoluinta kaj riĉa, 2) la plej gravajn kialojn, pro kiuj la Internacia Lingvo ne plu staras kie ĝi lingvaĵe troviĝis antaŭ 60 jaroj, kaj 3) la brutalajn persekutojn kontraŭ ĝi fare de pluraj reĝimoj.

Tio konsistigas efikan respondon al du rutinaj kaj danĝeraj demandoj, pri kiuj ŝajne okupiĝis la profesoro kaj liaj studentoj, ĉirkaŭ la teksto de la romano 1984 de George Orwell: Ĉu konstruita lingvo kiel la Zamenhofa konservus la kapablon nuancoplene esprimi ĉion, kio estas fajna kaj nobla en la homa spirito, aŭ ĉu kontraŭe ĝia adopto signifus mensan kripligon, tiel ke ĝin volus enkonduki nur registaro totalisma, ekzemple por detrui la individuan liberon?

Baldaŭ mi ricevis de la profesoro mem fotokopion de artikolo pri la libro 1984.

Intertempe atingis min interesaj informoj de prof. Gaston Waringhien, pri la tempo, kiun Orwell pasigis en Parizo. Laŭ angla biografio antaŭ nelonge aperinta, malmulto estas konata pri tiu periodo en la vivo de la aŭtoro. Nu, en sia letero de la 5a de majo 1984 nia franca korifeo levis pri tio, almenaŭ parte, la vualon:

”Via aventuro kun la studento estas amuza; sed ĝi eble havas kulisan materialon. Vi scias, ke la nomo de Orwell estas Eric Blair: li estis la nevo de Limuzin Neri, la dua edzino de Lanti. Inter la du militoj li venis loĝi ĉe Lanti, kaj ĉiam disputis kun li, ĉar Lanti principe uzis nur Esperanton en sia hejmo (Limuzin estis angla), kaj tio tre agacis Eric, kiu fine transloĝiĝis. Eble el tio li konservis rankoron kontraŭ nia lingvo, kaj karikaturis ĝin en sia romano.”

Waringhien pravas. Newspeak (Novparolo) estas eksterdube karikaturo de Esperanto. Kaj jen la malica konkludo de la diktaturo: ”Ĉu vi ne komprenas, ke la tuta celo de Newspeak estas mallarĝigi la gamon de la pensado? Fine ni laŭlitere nebligis la pensokrimojn, ĉar ne ekzistos la vortoj por ilin esprimi.”

Tiujn frazojn la profesoro el Pretorio citas en sia artikolo. Feliĉe, tamen, li ne ligis tion al la nomo de Esperanto. Kontraŭ tiu fono pli bone reliefigas la afero pri la studento, tiel specife demandinta min, ĉu en Esperanto eblas metaforoj kaj metonimio.

Mi reagis per plia letero.

Unue mi klarigis al la profesoro pri la du grandaj tendencoj en la esperantismo dum la pasintaj jardekoj: la movadoj neŭtrala kaj sennacieca. Tion mi opiniis necesa pro la informoj pri la rilato inter Orwell kaj Lanti, kaj ĉar ĝi implice evidentiĝas en la romano mem. Mi esprimis respekton al Lanti, sed emfazis, ke nuntempe absolute superpezas la idealo ne malaperigi sed kontraŭe protekti la naciajn lingvojn.

Due mi atentigis pri la grava evoluo en kaj per la literatura lingvaĵo, ligante tion prefere al la originala poezio. Mi do substrekis, ke la nuna Esperanto ĉe niaj plej bonaj poetoj jam estas io alia ol la lingvo vortŝpa-

rege skemisma de antaŭaj jardekoj. Intertempe ĝi mirinde evoluis.

Fine mi dankis la profesoron pro tio, ke en sia artikolo li ne aludis Esperanton laŭnome.

Montriĝis el lia respondo, ke miaj klopodoj ne estis vanaj. Li skribis afable, dankante pro la informoj. Li klarigis, ke lia artikolo ne menciis Esperanton, ĉar li ne volas verki pri io, kion li malmulte konas, kaj ĉar li ne volas lezi aferon de homoj, kiuj alcelas valorojn home tiel noblajn.

Bedaŭrinde tiu epizodo rilate al Orwell ne estas unuopaĵo, sed kompreneble temas pri problemoj kun radikoj pli profundaj ol la misaĵoj de tiu angla futur-

Arab-devenaj vortoj

En la pasintjara printempa numero de *Esperanto-turismo en Oriento*, redaktata de Enver Yalçın, Turkio, aperis listo de arabaj vortoj en Esperanto, kompilita de Badiollah Samimy (1913-1984). Samimy verkis la persan-Esperantan kaj Esperantan-persan vortarojn. La redakcio ne estas kompetenta juĝi ĝis kiu grado la listo estas ĝusta aŭ komplete, des pli ke oni ofte emas supozi, ke iu vorto devenas de multe parolata lingvo, dum kelkfoje tiu lingvo agis nur kiel perilo por vorto el pli malmulte parolata lingvo. Oni, ekzemple, ofte supozas, ke la vortoj *slogano* kaj *huligano* estas angladevenaj, dum ili fakte devenas el la irlanda.

Ni kredas, ke multaj legantoj interesiĝos pri la listo de arab-devenaj vortoj:

admiralo	haremo	kornico	sandalo
alambiko	haŝiŝo	kotono	santalo
algebro	henao	mastiko	satano
alkalo	hurio	mihrafo	sitelo
alkemio	ĥalato	minareto	spinaco
alkoholo	ĥamsino	moskeo	spongo
ambro	imamo	mosko	sufio
cedro	islamo	muezino	sukero
ĉemizo	jasbo	muftio	sultano
derviŝo	jasmeno	mulao	sumako
dinaro	kaabo	moslemo	surao
dragomano	kadio	nabobo	ŝarifo
efrito	kafo	nafto	ŝejko
emiro	kaido	narciso	ŝorbeto
fakiro	kalamo	nargileo	talismano
felaho	kalifo	ninufaro	talko
feluko	kamforo	paradizo	tamburo
gazalo	kando	pistako	tarifo
gazelo	karato	ramadano	taso
gehenao	karvio	robajo	teriako
hago	kedivo	robbo	tajfuno (ĉina?)
haloo	kerubo	safrano	ulemo
halvao	kiblo	samumo	veziro

romano, kiu baldaŭ perdos sian unujaran intereson. Tamen ĉio ĉi devus nin reatentigi pri faktoroj foje ne sufiĉe rimarkataj.

Estus naive kaj tempomalŝpare uzadi nur argumentojn cerbe logikajn, kvazaŭ la homo irus sian vivovoĵon ĉefe per la lumo de la racio. Li devus tion fari, certe, sed tiel ne estas. Ni do bezonas ankaŭ aliajn perspektivojn.

Tiu estas unu el miaj motivoj por prepari la antologion de originalaj poemoj, kun proztraduko naci-lingva. Sendube, tamen, ne mankos personoj, kiuj kontraŭĵetos, ke io tia ne povos alporti signifan avantaĝon. Kiom da homoj interesiĝas pri poezio? Sed rezoni tiel estus granda eraro.

Kompreneble la poeziamantoj estas malplimulto. Sed por nia temo konvenas atenti ion alian, nome ke la poemlegantoj, rekte aŭ nerekte, konsistigas hom-grupon surprize influan en la socio. Ĉu vere?

Ni nur rimarku, ke inter tiuj homoj troviĝas profesoroj kaj lekciistoj en la lingvodepartementoj ĉe universitatoj aŭ kolegioj. Ili dediĉas multe da tempo al la literaturo, inkluzive de la poezio. En Sud-Afriko la studobjekton nomitan "la angla" oni prezentas altlerneje preskaŭ nur pere de kaj por la literaturo.

Tiaj fakuloj en unu lando ne estas multnombraj, sed ni notu ilian influon, kiu koncernas principe la lingvon gepatran. Ili havas studentojn, kiuj ofte fariĝas instruistoj, kaj ĉi tiuj laboras en la lernejoj. Tie ili havas ne milojn sed milionojn da klasanoj, efektive la tutan civitanaron estontan. Ĉe tiuj ili kreas kaj plifortigas sintenojn pri la lingvoj lige al la kulturo. Tre facile tio povas esti malfavora al Esperanto. Do mi kredas, ke mia projekto koncernas aferon efektive gravan.

Edwin de Kock

REAGOO

Fake juĝu la lernilojn

Dufoje mi partoprenis la konferencojn de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj plurfoje la Lernejan Tagon en Universalaj Kongresoj kun la sama konstato, ke ĉio bonege sukcesis. Mi ne sentas, ke pluraj pedagogiaj aranĝoj estas duobligitaj, sed agadkampoj ne estas precize dispartigitaj, kaj mi havas angoran senton pri misfunkcianta kunlaboro.

En la movado, krom ILEI, ekzistas multaj pedagogiaj instancoj internaciaj kaj naciaj. Ili ĉiuj aktivas, sed ili ĉiuj sukcesis en tre grava agadkampo fari minimumon. Rilate lernolibrojn, ĉiu eldonejo reklamas sian eldonaĵon. Ĉiu aŭtoro opinias sian verkon supera al ĉiuj aliaj. Ne ekzistas kompetenta forumo, kapabla

deklari la faktan valoron de unuopa lernolibro – la plej grava portalo, tra kiu oni eniras en la movadon.

Ĉu miloj da pedagogoj en UEA kaj ekster ĝi, en ILEI kaj ekster ĝi, ne povus formi dekon da internaciaj komisionoj, kiuj fake, pedagogie kaj metodike prijuĝus ĉiun nun cirkulantan lernolibron, tiel ke la kursgvidantoj sciu la valoron de lernolibro, sen dependi de la eldoneja reklamo?

Emilija Lapenna (Jugoslavio)

Unua deviga instruado

En la novembra numero de *Esperanto* (p.182) prof. Stojan Ĝuĝev skribis, ke Bulgario estas post Hungario la dua lando en la mondo, kie la Internacia Lingvo estas devige instruata en mezlernejoj.

Mi deziras memorigi, ke la unua tia lando estis la insulo Samos (tiutempe princlando), kie jam en 1911 Esperanto estis oficiale kaj devige instruata. En tiu jaro d-ro Anakreon Stamatiadis (1867-1965) sukcesis realigi la unuan leĝon pri deviga instruado de Esperanto en ĉiuj ses lernejoj de la insulo. La tiama registaro de la insulo komisiis lin instrui ĉiujn instruistojn de la insulo, kion li faris kun bonega sukceso. En 1926 Stamatiadis fondis en Ateno Helenan Esperanto-Asocion kaj la postan jaron Superan Helenan Esperantan Instituton.

Emil Feist (FR Germanio)

Por bono aŭ malbono

Estis interese legi la informplenan recenzon de David Richardson pri la anglalingva sociologia studo *The Esperanto Movement* de Peter G. Forster (en la julia-aŭgusta numero de *Esperanto*).

Pri la ĉiam verda demando, ĉu nia lingvo estas "nur lingvo", do afero pure praktika, aŭ estas "ilo por pliproksimigi la popolojn, forigi militojn ktp.", ni memoru, ke ĉiu lingvo estas rimedo por ebligi komunikadon inter homoj. Ĝi ne estas vivanto, kvankam ni ofte figurparole personigas ĝin, kvazaŭ ĝi havus memstaran ekziston. Samlingvanoj povas kvereli kaj batali. La "internan ideon" kredas multaj el ni: ke la adopto de facile lernebla, adekvata, komuna lingvo pliigus pacon. Antaŭ pluraj jardekoj, iuj militistoj de unu grandpotenco interesiĝis pri Esperanto. Ili celis utiligi ĝin kiel la lingvon de la "malamiko" dum trup-ekzercadoj. (Temas pri *Esperanto*, *The Aggressor Language*, FM 30-101-1, eld. en 1962 de Department of the Army, Usono.) Klare, ili volis uzi ĝin kiel utilaĵon. Estas egale klare, ke oni povas uzi ĝin kiel amikigilon.

Tom Fraser (Britio)

Ĉiu povas helpi

Vi ne facile kredos tion, sed kelkaj el niaj problemoj estas kaŭzataj de nia konstanta progreso. Ekzemple, kiam ni lastatempe transiris de nia malnova komputilo al nova – pli malgranda, sed konsiderinde pli potenca. Nia oficeja koboldo inventis la plej petolajn trukojn por nin amuzi kaj konfuzi!

Alia nuntempa distraĵo, se ni ĝin bezonus, estas la alkonstruo de ĉambraro, kiu etendos la oficejan domon je 17 metroj longe kaj 7 metroj larĝe sur la ternivelo, okupanta spacon kie antaŭe estis nur ioma ĝardeno kaj kelkaj malbelaj kabanoj.

Vi ja facile kredos, ke tio ne estas dolĉe kvieta afero. Kaj ni apenaŭ bezonas aldoni, ke ĝi ne estas senkosta. Ni parolas pri proksimume kvarona miliono da guldenoj; sed poste venos kelkaj rafinaĵoj internaj kaj stratflankaj, kiuj interalie ebligas pli agrablan aliron al la Libroservo.

Ili estas vere dezirindaj plibonigoj, kies kostojn ni kompreneble zorge kontrolas. Tiuj kostoj ne estas por la spezokonto sed por la kapitalaj kontoj, ĉar temas ĉi tie pri investo. Tio ne signifas, tamen, ke ni ne bezonas monon! Por pagi la pezajn fakturojn de la konstruistoj, ni efektive serĉas tre grandajn sumojn; bezonata estas „likida mono”, kiel ni diras. Ĉu ni rezignu pri tiu rezervo aŭ vendu tiujn akciojn estas nun oftaj demandoj.

Feliĉe, bonfaraj membroj ege helpis nin protekti niajn rezervojn per ”aĉeto” de ĉambroj en la nova alo. Fakte, ĉiuj membroj povas nin helpi, se ili volas. Pli modeste ol per aĉeto de ĉambro, evidente; sed ne malpli pozitive. Kiel?

Do, unue, per frua pago de la venontjara kotizo, ekzemple. Se ĉiu membro pagus ĉi-jare unu monaton pli frue ol kutime, ni sentus ondon da enfluo, kiu tre helpus la kason dum la elfluaj monatoj venontaj. Kaj... jen eĉ pli bona ideo.

Ĉu vi volas ŝpari monon, en sekuraj valuto kaj loko, je regula interezo de 6%? Tio vere estas merkate favora tarifo por la guldeno, kaj la guldeno estas kaj supozeble restos unu el la plej stabilaj valutoj en la mondo.

Kial ni estas pretaj pagi al vi tiun altan renton? Ĉar ni estas en bona pozicio por reinvesti la ricevatajn ŝparaĵojn – kunigitajn en pli grandaj monsumoj – en obligacioj kaj akcioj, kiuj redonas al ni eĉ pli altajn gajn-ojn. Tio estas kutimo, kiun ni jam komencis antaŭ du-tri jaroj. Ni profitas de la konsiloj de profesiaj konsilistoj laŭbezzone, kaj ni konvinkis nin, ke la politiko estas sekura kaj rendimenta por UEA kaj por ĝiaj membroj.

Ĉu vi interesiĝas? La bazaj minimumoj por tiuj ŝpardeponoj estas mil guldenoj por 12-monata periodo. Pliajn detalojn vi povas peti ĉe la Centra Oficejo. La folioj ”Financaj Servoj de UEA” kaj la regularo pri Fiksdataj Deponoj estas je via dispono.

☆☆☆

Multaj membroj ankoraŭ memoras kaj citas siajn kontonumerojn. Ni ne povas ne admiri tion, sed post aŭtomatigo de la kontoj ili ne plu havas numerojn! Kiam vi skribas pri konto, aŭ kiam vi ĝiras monon al ni, estu do tiel afabla citi vian UEA-kodon – ĝi estas samtempe via kontokodo. Tio ja ŝparas al ni tempon, kaj tempo estas mono.

John Rapley

Revenzoj

Dek kvar interlingvistikaj prelegoj

Scienca interlingvistika simpozio, red. Ryszard Rokicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1984. 160p. 21cm. Acta Interlinguistica. Prezo: 18,00 gld.

De pli ol dek jaroj okazas en Varsovio interlingvistikaj simpozioj, kaj nun oni sentas sin maturaj publikigi iom da rezultoj. La volumo enhavas 14 teme, amplekse, sed ankaŭ kvalite sufiĉe malsimilajn kontribuojn, ĉefe de 1983.

Kio estas interlingvistiko? La vorto sugestas, ke ĝi estu la scienco pri interlingvoj. Aŭ eĉ pli vaste, ke ĝi studu ĉion, kio okazas ĉe kontakto inter lingvoj. Se oni konceptas ĝin ĉi tiel, la foje kritikita difino de Mario Wandruszka (*Interlinguistik*. R. Piper Verlag, Munkeno 1971) eĉ ne estas tiel kontraŭa al la esperantista kompreno de la vorto, sed nur pli vasta. Tamen la jena volumo sekvas tiun esperantistan difinon, laŭ kiu interlingvistiko egalas al planlingvistiko. Věra Barandovská eĉ demandas, sed ne vere respondas, ĉu ĝi ne simple estas esperantologio. Ŝi ankaŭ kontribuas artikolon el la idehistorio de la planlingvismo, pri Kome-nio (1592-1670) kaj liaj ideoj pri filozofia universala lingvo. Krom ĝi, ĉiuj artikoloj estas iel esperantologiaj. Apud la ĝenerale interlingvistikaj temoj de Barandovská aperas kvar temgrupoj: la interna ideo, lingvo-evoluo, genera gramatiko, kaj, plej detale traktita, la vortprovizo.

La Esperantan vortprovizon eblas rigardi el tre malsamaj vidpunktoj. Jen aperas esence kvar. La malnovan kaj kelkfoje emocie diskutitan problemon pri la gramatika karaktero de la radikoj aliras Balázs Wacha kaj Sándor Révész. Révész provas iusence

ĉirkaŭiri la problemon, esplorante, kiuj morfemkombinoj aperas kun la koncerna radiko, kaj li postulas rezulte norman vortaron, kiu indiku la tiel trovitan strukturtipon, propono kiu memorigas (sed ne egalas) al la "ĉirkaŭaĵoj" de la genera gramatiko. Proksime najbara estas la dua subtemo: vortfarado. La nombron de teorie kaj fakte eblaj derivaĵoj de unu radiko serĉas Antoni Golonka, dum Ryszard Rokicki amplekse esploras la klasadon de leksemoj, trovante krom la el etnolingvoj konataj vortfarmanieroj ankaŭ specifajojn de Esperanto, kiujn laŭ li lernolibroj agnosku kaj utiligu por la instruado. Trie, Zbigniew Kornicki donas koncizan detalstudon pri morfemfrekvencoj. Kvare aperas kritikoj de difinoj kaj uzoj de terminoj en *Plena ilustrita vortaro* (kaj parte en *Plena analiza gramatiko*), nome pri lingvistiko de Michel Duc Goninaz kaj pri arkeologio kaj parencaj sciencoj de Bernard Golden. Ambaŭ vane serĉas koherecon, konsekvencecon kaj ĝisdatan fakkonon.

Jerzy Leyk tre koncize skizas la norman teorion de la genera gramatiko laŭ Chomsky, aplikas ĝin al Esperanto kaj proponas modifon, kiu igas la semantikan komponenton malpli interpreta kaj pli memstara.

Por nelingvista leganto aparte interesaj estas la lastaj du temgrupoj, ĉar ili penetras en la sanktejojn de la esperantismo. Lingvo-evoluoj ŝajnas al multaj esti sakrilegio kontraŭ la principo de la netuŝebla *Fundamento*. François Lo Jacomo – kies artikolo estas mallonga, sed kompanse do Esperanta resumo de lia disertacio – distingas evoluon, kiu egalas al ŝanĝo, kaj pliriĉiĝon, kiu aldonas sen ŝanĝi. Li montras, ke evoluo, do ŝanĝo, ja okazadas, tamen kontraŭ la malaprobo de la parolantaro. Francisko Simonnet komparas evoluon en la latina, la franca kaj Esperanto kaj konkludas, ke "kultura lingvo" (laŭ mi dubinda termino) havas tratempan komunikan funkcion, pro kio ĝi kiel eble evitu ŝanĝon. Lo Jacomo konstatas, Simonnet pledas, tiel reprezentante la du tendarojn, kiujn havas ankaŭ etnolingvoj: priskribajn lingvistojn kaj lingvoflegistojn.

Per la etikedo "interna ideo" por la lasta temgrupo mi jam interpretas. Fakte la aŭtoroj ne tiel nomas sian studobjekton. Tyburcjusz Tyblewski emfazas la neceson peri al lernanto de Esperanto ne la komunikan kompetencon por situacioj, kie uzeblas iu ajn lingvo (sed kutime ne Esperanto), sed ĝuste celi al internacia personeco. Barbara Jędrzejczyk-Rokicka traktas similan ideon por uzi ĝin kiel instigilon al lernado de Esperanto. Ambaŭ estas ideaj parencoj de Baldur Ragnarsson (en *Esperanto*, aprilo 1984), kaj ŝajnas al mi, ke ĉi tiel plurfoje revenas al ni en niatempa vesto la interna ideo. Zamenhof siatempe tutprave malligis ĝin de la nura lingvo Esperanto, sed ŝajnas ke jam de kelka tempo post preskaŭ centjara maturiĝo, Esperanto nun povas elteni almenaŭ internan debaton pri la ideo fono de internacia lingvo. Eble Esperanto ja

malgraŭ ĉio finfine estas pli ol nur praktika faciligo. La ideo de lingva justeco, kiu paŝon post paŝo kondukis la movadon el sterila al aktiva neŭtraleco, nepre kondukas al la nunaj diskutoj.

Per kio mi el lingvistikaĵo sukcesis ŝajne fari movadaĵon? Tio ĝi tamen feliĉe tute ne estas.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Subtila humuro

El *Anatol*; kvin unuaktaĵoj (1893), Artur Schnitzler (1862-1931). El la germana trad. Leopold Grimme k.a. Vieno: Aŭstria Esperanto-Instituto, 1983. 67p. 21cm. Prezo: 9,90 gld.

Pro tio, ke multaj konas la vian dramverkiston nur pro la skandalo, kiun kaŭzis lia scenaro *La rondo*, estas laŭdirinde, ke Aŭstria Esperanto-Instituto kaj ties tradukista teamo havigas al internacia publiko multe pli gravan verkon de tiu ofte mistaksata aŭtoro: la "Anatol"-ciklon. La sep (aŭ ok) unuaktaĵoj, el kiuj bedaŭrinde nur kvin estis aperigitaj en ĉi tiu eldono, kondukas nin al la mondo de la virindelogisto Anatol kaj la urbo Vieno, kia ĝi estis fine de la lasta jarcento. Kvankam multe malpli skandale, la aŭtoro sukcesas krei tian erotikan etoson, kiu – nekompreneble al tiuj, kiuj nuntempe legas aŭ spektas tiujn teatraĵojn –



siatempe kaŭzis la malpermeson kaj cenzuradon de liaj verkoj.

La teatraĵoj de la "Anatol"-ciklo estas tre mallongaj kaj konsistas ĉefe el dialogoj, kio kreas maldinamikon, malfacile vivigeblan sursceneje. Tial, mi rekomendas ĉi tiun libron precipe kiel legaĵon. Ankaŭ la humuro fontas el dialogaj subtilaĵoj. Foje, ĝi estas tiel rafinita, ke tiuj, kiuj ne tiel hejmas en la pensmanieroj de la eŭropa etburĝaro, kiun Schnitzler satire kritikis, nur malfacile aprezos la verkon. Tamen, ekzistas publiko por la libro, kiel pruvas la aperigo de unu el la scenoj en *La brita esperantisto*. Kaj tiuj, kiuj ankoraŭ travivis la finiĝantan "belan epokon" antaŭ la unua mondmilito, certe tre ŝatas esti memorigataj de Schnitzler.

Kvankam oni povas diveni, ke la teksto estas tradukita el la germana, la traduko estas ĝenerale senriproĉa. Ĝi estas bele kompostita, tiel ke la malmultaj prezeraroj apenaŭ ĝenas. La desegnaĵo sur la kovrilo donas al la libreto apartan ĉarmon.

Martin Haase (Francio)

Erudiciisma traduko

La robaioj, Umar Kajjam (ĉ. 1045-ĉ. 1122). El la persa trad. (1953) Gaston Waringhien (1901). Antverpeno/La Laguna/Chapécó: TK/Stafeto/Fonto, 1984 (2a eld.). 107p. 21cm. ISBN 90 3660 032 0. Prezo: 12,00 gld.


De mia patro mi heredis nur unu libron. Lin, soldaton, ĝi akompanis konstante. Temis pri la poemoj de Kajjam, en tiu angla traduko/reverko de Fitzgerald, kiu unue – ok jarcentojn malfrue – diskonigis ilin tra la okcidento.

Neniam mi sukcesis heredi la patran entuziasmon pri Kajjam, eble parte pro lia malvasta temaro, sed eble ĉefe pro alergia kontraŭ la "alta" poezia stilo de Fitzgerald. Do nun, jen amiko Umar kun nova ŝanco plaĉi al mi pere de la (reviziita kaj ampleksigita) traduko de Waringhien.

Nu, la temaro restas malvasta. Efektive, la verko prezentas la eminentan fortostreĉon esprimi manplenon da ideoj en plurcent manieroj. Esence, ĝi estas himno al la vino – "Cent korojn kaj cent kredojn pokal' da vin' valoras" – kaj pridubigo de la religiaj dogmoj, precipe pri vivo postmorta: "Kian valoron havas ĉi tero kaj la mondo?/Nur sonĝo, iluzio, trompaĵ', ĥimer': jen ĉio." "Iru do drinki! Mi vin milfoje jam admonis:/oni ne plu revenas – sepult' estas supulto!"

En la erudiciisma (kaj iom okcidentisma) enkonduko de Waringhien embuskas surprizo. Tiuj voluptaj infiguroj, kiuj ofte ilustras la verkon de Kajjam – kaj, kontraŭdire, eĉ tiun ĉi kovrilon – estas trompo. La "am-idolo" de la poeto, tiu "trezor' keruba", "kies

En la renoma Serio Oriento-Okcidento de UEA
multilate unika verko,
kiu mankas al la plimulto de la naciaj lingvoj:



Elpafu la sagon

Tibor Sekelj

**el la buŝa
poezio
de la mondo**

137 buŝaj versaĵoj, rikoltitaj de la etnografo Tibor Sekelj dum liaj esplorvojaĝoj, tradukitaj el 24 lingvoj, ofte de malmulte konataj popoloj.

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1983. 187p., 21cm. Prezo: 27,00 gld. (broŝ.); 36,00 gld. (tole bind.), plus sendokostoj. Triona rabato ĉe samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj.

vango pli freŝas ol de l' rozo", necese estis knaba, ne knabina.

Ĉu al Kajjam pli taŭgas la Esperanta kostumo, ol la angla? Iom, jes. Kiel la originalo, ankaŭ la traduko de Waringhien prezentas eminentan fortostreĉon. En la 211 robaioj (t.e. kvar-versaj poemetoj), li konservis la trioblajn – foje eĉ kvaroblajn – rimojn kaj maltimis redoni eĉ vortludojn; kaj mi volonte kredas la aserton (cititan antaŭparole), ke "la plej fidela traduko de Umar Kajjam estas la Esperanta".

Aliflanke, dum Fitzgerald ĝenis min per troa "poezieco", Waringhien min ĝenas per la kontraŭo. La Esperanta aleksandro bonas, se regula, sed lamas, se perfortita. Troviĝas, feliĉe, multaj versoj, kiuj fluas klare kaj senpene. En aliaj, tamen, tro oftaj licencoj, tro da balastaĵoj ("roze koloran", "miaj du oreloj"), neprobablaj aŭ stumbligaj kunmetaĵoj ("polv-aglomer'", "Noktfalo") konsciigas la leganton pri la sanga batalo de la tradukinto. La granda fleksebleco de Esperanto tentas la tradukantojn forgesi, ke ankaŭ ĉe ni ekzistas lingvaj kutimoj; ignori ilin signifas perdi naturecon kaj, sekve, poeziecon. Finfine, ne pro ĝia tradukfideleco soldato ŝargas poemaron kun sia municio.

Fine, kial ĉi tiu volumo ne povis aperi en la tro malekvilibra Serio Oriento-Okcidento de UEA? Se

nur pro siaj modestaj formato kaj amplekso, ni do reviziu la regularon. Tiaj teknikaj skrupuloj ja ne bremsas la analogan traduk-programon de Unesko.

Victor Sadler (Brazilo)

Botanika nomenklatur

Komunlingvaj nomoj de plantoj de nord-okcidenta Eŭropo, Provizora privata listo de, Wouter F. Pilger. Lelystad: Vulpo, 1982. 72p. 21cm. ISBN 90 70074 31 1. Prezo: 12,00 gld.

Estas ĝojiga evento, ke Esperanto jam estas uzata por biologiaj sciencoj. Urĝa premiso por sukcesa laboro en ĉiu scienca fako estas preparo de stabila terminologio kaj nomenklatur. Latinaj nomoj de plantoj jam ne sufiĉas por pli vasta uzado, precipe en populara literaturo. Estas urĝe necesa botanika vortaro por esperantistoj. Tiun taskon efektivigi prenis sur sin W.F. Pilger per tiu ĉi libreto, kiu enhavas latinajn kaj Esperantajn nomojn por pli ol du mil sovaĝaj superaj plantoj (kormofitoj). La aŭtoro prezentas sian verkon kiel provizoran liston. Tamen post la presigo ĝi jam fariĝis publika ne plu privata.

Plantaj nomoj laŭ sistemo de Linné estas binaraj, ili konsistas el genra kaj specia nomoj. Por genra nomo la aŭtoro uzas latinan radikon kun Esperanta finaĵo. Por speciaj nomoj li elektis la sistemon de "alnomoj", kreitaj surbaze de morfologiaj ecoj. Tiam formadon de plantaj nomoj ankaŭ mi aprobas. Tamen multfoje la aŭtoro proponas, kiel sinonimojn, ankaŭ Esperantajn tradukojn de genraj nomoj, ekz. kornofloro (por *Cerastium*), aglofloro (*Aquilegia*), kaskofloro (*Aconitum*), kuglopeniko (*Globularia*) k.a. Por populara literaturo oni povas rekomendi tiajn sinonimojn.

Tamen en kelkaj kazoj la aŭtoro mencias la samajn sinonimojn por diversaj plantoj, ekz. "steleto" (p.8) estas aldonita por kvar genroj. La sinonimo "rakedo" (p.14, 15 kaj 16) estas aldonita por aliaj. La nomo "kreso" estas indikita por kelkaj genroj de kruciferoj. Simila okazo estas kun "ĉevalpiedo", uzita por *Petasites hybridus* kaj *Tussilago farfara*. Mi opinias, ke "rakedo" estas tute forigenda el la botaniko, "kreso" povas resti por unu genro, eble *Lepidium*, "steleto" trafas por *Stellaria*.

Nekutima estas la vica ordo de nomoj, uzata de la aŭtoro. Por legantoj estus pli facile orientiĝi, se la materialo estus ordigita laŭ la latina alfabeto. Se la aŭtoro preferis ordigi plantojn laŭ familioj, tiam estas necesaj surskriboj de koncernaj familioj sur konformaj lokoj. En la listo troviĝas eĉ interspacoj, lasitaj kvazaŭ por familiaj nomoj. La aŭtoro skribas sur p.62, ke nefakuloj apenaŭ uzas familiajn nomojn, tamen por lernantoj estas necese koni ilin. Distribuo de familioj devis esti farita laŭ filogeneza sistemo de

Engler, dikotiledonan klason komencante per *Polycarpicae*, ne *Salicales*. Sur p.51 mankas surskribo de nova ĉapitro "Monokotiledonaj plantoj" post la krepidoj.

La ĉapitro "Iuj plantoj malklarfloraj" (p.57-60) estas superflua. Pli ĝuste estus tiujn plantojn dispartigi laŭ familioj. Por la ĉapitro "Iuj senfloraj plantoj" (p.61) pli ĝusta titolo estus "Pteridofitoj" kun du sekcioj: Ekvisetinoj kaj Filicinoj. Laŭ filogeneza sistemo la deca loko por tiu ĉi ĉapitro estas antaŭ gimnospermoj.

Tiuj ĉi rimarkoj esence ne malgrandigas la sciencon valoron de la recenzata verko, kiu prezentas bonan kaj riĉan materialon por plua progresigo de la botanika nomenklatur. Dezirinde, ke estontan prilaboron de botanika terminaro daŭrigu ne apartaj personoj, sed komisiono, formita el reprezentantoj de diversaj geografiaj regionoj.

Jonas Dagys (Sovetunio)

Versaro el Kartvelio

Aforismoj, Ŝota Rustaveli (12a jc.). El la kartvela trad. Zurab Aleksandroviĉ Makaŝvili. Tbiliso: Mecniereba, 1983. 78p. Mimeo. 20cm. Dulingva: kartvela-Esperanta. Prezo: 6,00 gld.

Ŝota Rustaveli, plej elstara poeto en la kartvela lingvo, florinta fine de la 12a jarcento, estas aŭtoro de la longa poemo "Tigrofelulo". Manke de kompleta traduko de tiu verko (ho, kia tasko estus tio!), ni devas dume kontentiĝi per tiu ĉi agrabla kolekto de versoj, grandparte unuopaj sed kelkfoje du- aŭ kvaropaj, prezentitaj kiel aforismoj.

Kio karakterizas aforismon, tio estas pli la formo ol la enhavo. Kutime ĝi estas (laŭ la verso de Alexander Pope) "ofta pensaj' jam trafe esprimita"; aŭ, kiel diras Rustaveli mem: "Parolado longa kurtas – jen valor' de poezio". La Esperanta tradukinto tradukis



formfidele, imitante la 16-silaban *ŝairi* de la originalo. Tio, kun la rimado, kiam tion postulas la originalo, supozigas al mi, ke la traduko estas tre zorge prilaborita. (Mi ŝatus scii, tamen, kio estas "miĝnuro"? Tiu ne troviĝas inter la 126 vortoj kartvele glositaj en la libro; iom surprize, tiu listo enhavas kelkajn tre ordinarajn vortojn, kiel "plezuro", "dio", "scio", "mondo" – kial? oni scivolas).

Tamen, eĉ kun formo la aforismoj de Rustaveli tro ofte efikas sufiĉe banale: "Homo ja ne ŝanĝas sorton nek evitas la destinon", "Ne evitas ja la homo baton de ĉiel-kolero", "Fia homo ĉiam hastas al malbono kaj fi-famo" ks. Nur la pli ampleksaj ekhavas iom da potenco:

*Malavaro senvirtulon forte ligas kaj imponas,
Malavaru – eĉ la maro akvon prenas kaj redonas.*

Neeviteble oni sopiras denove al la kompleta poemego.

Tiu ĉi eldono estas dulingva, kun apudmeto de originalo kaj traduko. Tiel estetike bela estas la kartvela literaro, ke ĝi aldonas al mia plezuro posedi tiun ĉi plaĉan volumeton.

William Auld (Skotlando)

Intima meditado

La prezo de la elaçetado, Erwan ar Menga. El la bretona trad. la aŭtoro. Saint-Brieuc: Les Presses Bretonnes, 1982. 111p. 21cm. Prezo: 15,60 gld.

La originala teksto (*Priz an Daspren*) aperis en 1982 kaj anoncis, ke ekzistas ankaŭ versio en Esperanto. La nuna verko rakontas la vivon de Jesuo, kun aparta substreko de liaj suferoj, pligrandigitaj de la antaŭscio. Laŭ la maniero de historiaj romanoj la aŭtoro volas refortigi la evangelian rakonton, por iuj eble malpli efikan pro la troa konateco, provante penetri en la menson de Jesuo. Tiel ŝafblekoj kaj laodoro de la bruloferoj rememorigas al la 12-jara Jesuo, ke li estas la Ŝafido de Dio (p.25); kaj oni ne ŝparas al ni la teknikajn detalojn de la krucumado kaj la klinikajn fazojn de tia morto. Ja en ĉi tiu sia celo la aŭtoro plene sukcesis.

Oni atendas de mi komparon kun la originalo. Ŝanĝoj estas malmultaj: ekz. aldonaĵoj estas la lastaj tri paragrafoj de ĉapitro 1, la dua de p.99, kaj la citaĵo de Tobit (p.109); ellasitaj estas la antaŭlasta paragrafo de p.20, kaj kelkaj frazoj el la unua sur p.83 kaj ĉe 90/linioj 4 kaj 7. (El la listo de homaj plagoj (p.9) la ellaso de *kozhni* "maljuneco" devas esti pro preteratento.) Plurloke li kaptas la okazon korekti: ekz. *sciis* fariĝas "kredis" (29/-3), *la Dekunu* fariĝas "la Dekdu" (40/5), *al liaj malamikoj* fariĝas "al la elirejo" (greka "eliris", Esperanta Nova Testamento "antaŭen") (53/9), *demandi Jesuon pri liaj disĉiploj* fariĝas "demandi liajn disĉiplojn" (61/15), *ili* fariĝas

"mi" (96/-1) (sed en la antaŭa linio "Vi" devus troviĝi antaŭ "kuŝigas", kiel ĉe la hebrea kaj Zamenhof), *volas* fariĝas "asertas" (kiel en la greka kaj Vulgato) (108/9).

Erwan ar Menga reverkis sian bretonaĵon en bonega Esperanto. Mi tamen rekomendas uzi "antaŭol" anstataŭ tempa "antaŭ", kiam sekvas akuzativo (48/7), ne meti "por" post "neeblon" kaj infinitivon (44/8), kaj ne uzi la perfektan kondicionalon en la franca senco (ĉi tie ankaŭ la bretona!) de "laŭ oni-diro" (100/15). Eraro estas "ĝis" por "tiel longe kiel" (laŭ Zamenhof "kiam") (71/-3; vidu *Plena ilustrita vortaro*, p.367).

La verko apartenas al ĝenro (la intima meditado) necesa al ĉiu literaturo.

D.B. Gregor (Britio)





Bulgara-Esperanta vortaro, Violin Oljanov k.a. Sofio: Nauka i Izustvo, 1981. 430p. 21cm. Bind. Ampleksa vortaro kun ĉirkaŭ 16 500 artikoloj. Prezo: 28,50 gld.

Centa simio, La (1982), Ken Keyes Jr. El la angla trad. Joek Naber-Keller. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1984. 135p. Ilus. 20cm. Kolekto de opinioj kaj komentoj pri la dezirindeco de nuklea malarmado. Prezo: 7,50 gd.

Du kolombetoj, Feri Floro. Bad Soden (FR Germanio): Lothar Kuhn, 1983. Stereofona kaseto kun teksto. Dek du variaj kanzonoj. Prezo: 20,70 gld.

Enkonduko en la kategoriojn de Aristotelo, Porfirio la Fenica (232-305). El la pragreka trad. Evaldo Pauli. Chapecó: Fonto, 1983. 79p. 21cm. Biblioteko de Filozofio: Serio "Klasikuloj de la Filozofio". Traktado de logiko de fama helena filozofo, kiu havis grandan influon al la mezepoka instruado de la filozofio en Eŭropo. Prezo: 7,80 gld.

Esperanto and Machine Translation, Ian D.K. Kelly. Londono: Esperanto Centre, 1983. 4p. 30cm. Anglalingva informbroŝuro pri la utilo kaj stato de Esperanto en maŝina tradukado. Prezo: 3,60 gld.



Lasu min paroli plu!, Claude Piron (1931). Chapecó: Fonto, 1984. 127p. 21cm. Lingvo-instrua romano kun paralelaj tekstoj al *Gerda malaperis!* de la sama aŭtoro, celanta malkovri al la leganto la esprimopovon de Esperanto. Prezo: 13,80 gld.

Max kaj Moritz; Buba rakonto en sep petoloj (1864), Wilhelm Busch (1832-1908). El la germana trad. Franz Döring (1889-1959). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 58p. Ilus. 21cm. Jubilea Eldonserio: 2 Beletro tradukita 8. Amuza, abunde ilustrita poemo por infanoj, de unu el la fondintoj de la germana bildstria arto. Prezo: 8,40 gld.

Morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko, La (1961), Jorge Amado (1912). El la portugala trad. Geraldo Pádua. Chapecó: Fonto, 1984. 109p. Ilus. de F. Teixeira. 21cm. Fonto-Serion-ro 1. Parto de la pli granda verko *La malnovaj maristoj* de brazila verkisto, konata i.a. pro kunplekto de sociaj kaj lirikaj elementoj; kun biografio. Prezo: 12,00 gld.

80 Jahre Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main E.V., 1904-1984. Frankfurt am Main: Esperanto-Gesellschaft, 1984. 32p. Ilus. Mimeo. 21cm. Artikoloj kaj informoj okaze de la 80-jara jubileo de la Esperanto-Societo de Frankfurt am Main. Prezo: 4,50 gld.

Perfektigo de la evoluinta socialismo kaj lukto por la paco sur la planedo, K.U. Ĉernenko. El la rusa trad. L. Novikova kaj V. Aroloviĉ. Moskvo: Novosti (APN), 1984. 62p. 20cm. Oficiala parolado. Prezo: 3,00 gld.

Pri dubo kaj certeco, Evaldo Pauli (1924). Chapecó: Fonto, 1984. 162p. 21cm. Biblioteko de Filozofio. Traktaĵo de universitata profesoro pri la gnozeologia problemo – la demando pri nia konkapablo. Prezo: 12,60 gld.

Rekta pensado, Evaldo Pauli (1924). Chapecó: Fonto, 1984. 149p. 21cm. Biblioteko de Filozofio: Serio "Edukado". Studo de universitata profesoro pri la pensado sub la sekcioj "Intelektisma edukado", "Menso bone farita por plibone funkcii", "Plenigo de kapo, ne facila afero". Prezo: 12,60 gld.

Sankta Biblio, La. La Malnova Testamento, laŭ la masora teksto, tradukita de L.L. Zamenhof; la Nova Testamento, laŭ la teksto de Nestle, tradukita de Brita Biblia Komitato; ambaŭ tradukoj reviziitaj de tiu komitato. Londono/Edinburgo: Brita kaj Alilanda Biblia Societo/Nacia Biblia Societo de Skotlando, 1984 (represo). 771+225p. 19cm. ISBN 0 564 00138 4. Prezo: 30,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

Kalendaro

Tutjare

Kursoj, turismaj kaj kulturaj aranĝoj, Varna kaj Smoljan, Bulgario (Internacia Esperanto-Kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)

Internacia Feria Altlernejo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds); Gastejo Edmond Privat, samloke, ebligas tutjaran feriadon.

Internacia Esperanto-Lernejo en Bydgoszcz kaj Toruń, kaj aliaj Esperantaj turismaj aranĝoj, Pollando (Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

Turismaj semajnaj restadoj en Istanbul kaj Bursa, Turkio (Matur Turizm, Esperantlingvaj servoj, İnönü Caddesi 15/1, Bursa)

Unu- kaj dusemajnaj flugoj Belgio-Bulgario (Esperantotur, Montoyerstr. 37 B 24, B-1040 Bruxelles, Belgio)

Januaro

18-22 50a Kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, Wellington, Nov-Zelando (LKK, P.O. Box 330, Wellington)

28-31 Tagoj de Argentina Kulturo en Zagrebo (Kroatia Esperanto-Ligo, Amruševa 5, YU-41000 Zagreb, tel: 041/424 660)

Februaro

01-03 2a Tutbharata Esperanto-Kongreso, Kalkato, Hinda Unio (S. Pal, 35/1 Swami Vibekananda Road, Howrah 711 101)

Marto

04-10 Internacia Skisemajno, Norvegio (S-ino T. Kawakami-Nielsen, p/a NEL, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo)

08-10 Internacia Foiria Esperantista Renkontiĝo, Leipzig, Germana DR (IFER, Käthe-Kollwitz-Str. 115, DDR-7010 Leipzig)

21-25 Konferenco pri Publika Klerigado, Budapeŝto, (Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 193, H-1368 Budapest)

22-24 2a Internacia Memorkunveno "Ivan Flanjak", Osijek, Jugoslavio (Kose "Ivan Flanjak", Pf.27, YU-54000 Osijek)

22-26 3a Teatra Festivalo en Budapeŝto (Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 193, H-1368 Budapest)

30-06 apr. Internacia Esperanto-Semajno, Nice, Francio (R. Llorens, 121 bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice)

31 Limdato de la Belartaj Konkursoj de UEA; Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝos.

Aprilo

05-08 Paska Renkontiĝo de Nederlanda Esperanto-Junularo, Loenen, Nederlando (S-ino M. Creuwels, Balijelaan 16, NL-3521 GR Utrecht)

05-08 68a Brita Kongreso de Esperanto, Llandudno, Kimrio (64 Bryn Castell, Conwy, Gwynedd LL32 8LF, Britio)

05-12 Printempa Semajno Internacia, Bielefeld, FR Germanio (Franz Kruse, Mathildenstr. 73, D-2800 Bremen 1)

10-17 Seminario por Grupgvidantoj de TEJO/PSEK, Pollando (J. Koszmaluk, ul. Okopowa 43/144, PL-01-059 Warszawa aŭ F. Kruse, vd. supre)

En la marta numero ni, kiel kutime, aperigos kompletan kalendaron. Se vi ne jam sendis al la Centra Oficejo informojn pri via renkontiĝo, bonvolu fari tion plej laste ĝis la 5a de februaro.

● **Belgio:** Dum la pasinta jaro la franclingva gazetara servo de Belga Esperanto-Federacio, sub la gvido de Germain Pirlot, sukcesis aperigi pli ol 250 leterojn kaj artikolojn pri la Internacia Lingvo en la belga gazetaro. Tio montras, ke tiu informa laboro tre kontentige progresas, ĉar en 1983 aperis jam 167 leteroj kaj artikoloj.

● **Ĉilio:** La nacia junulara bulteno *Juna Ĉilio* aperas de 1983. Ĝi havas ok grandformatajn mimeografitajn paĝojn kaj estas la oficiala bulteno de la junu-

lara sekcio de Ĉilia Esperanto-Asocio (Casilla 13828, Santiago 21). Ĝin redaktas Héctor Campos-Grez.

● **FR Germanio:** La ĉefdelegito en FR Germanio, s-ino Elisabeth Hirsch, sendis al ĉiu delegito en sia lando cirkuleran informpeton. Reagis 70% de la delegitoj. Ili dum 1984 respondis al ĉirkaŭ 2 670 leteroj, ricevis vizitojn de 481 eksterlandanoj, mem dumvojaĝe uzis la delegitan reton 113-foje, verkis 262 informojn por gazetoj kaj komencis 54 kursojn aŭ seminariojn.

moj kaj internaciaj rilatoj. Ŝi notis i.a., ke oni preskaŭ nenion faras ĉe Eŭropa Komunumo rilate al kulturaj kaj lingvaj problemoj. S-ro Ercini substrekiis, ke la problemoj estas antaŭ ĉio "politika", ĉar ne solvinte ĝin, oni kaŭzas gravajn damaĝojn kaj ekonomiajn kaj homajn al ŝtatoj kaj homoj. Li promesis agi ĉe Eŭropa Parlamento.

● **Literaturo:** *Nudpieda Gen*, la bildrakonto pri la atombombitoj, en Esperanta traduko de Izumi Yukio, estas represata. En 1983 la libro ricevis la premion "Infanlibro de la Jaro" okaze de la Universala Kongreso en Budapeŝto. Rondo Gen, la eldondgrupo de la libro, jam ricevis de Esperanto-Ligo de Norda Ameriko antaŭmendon por 250 ekzempleroj, tiel ke ĝi decidis presigi mil ekzemplerojn, kun revizio kaj aldono pri la reeĥo de la unua eldono.

● **Ekologio:** *Heroldo de Esperanto* eldonas ekologian suplementon kun kvar tiutemaj artikoloj. Se vi deziras ricevi ĝin senpage pro intereso aŭ por informado, bonvolu skribi al Heroldo de Esperanto, Calle J. Ramon Jiménez 28, 6.A, E-28036 Madrid, Hispanio (por aerpoŝta sendo aldonu internacian respondkuponon).

● **Fervojoj:** La kunlaboro inter norvegaj esperantistoj kaj la norvegaj fervojoj estas aparte fruktodona. Ĝis aperis en Esperanto du plenkoloraj faldfolioj. La faldfolio *Vojaĝu kun ĝojo per Norvega Ŝtata Fervojo NSB* estas senpage havebla de Norges Statsbaner, Informasjonskontoret, Storgt. 33, N-0184 Oslo 1, Norvegio. La alia plenkolora faldfolio nomiĝas *La fervojmuzeo Hamar*. Ĝi senpage akireblas de Jernbanemuseet, Postboks 248, N-2301 Hamar, Norvegio.

● **Lingvo:** Kompetentajn kunlaborantojn, kiuj konsentos aktive partopreni en internaciaj, neesperantistaj renkontiĝoj serĉas Edward Symoens (Putsesteenweg 131/A, B-2180 Kalmt-hout, Belgio; tel. 03/666 62 66). Temas unuavice pri internacia kolokvo pri "Minoritataj lingvoj kaj edukado" en Sitges, Hispanio, de la 11a ĝis la 15a de junio kaj internacia konferenco pri "Lingvoj, teknologio kaj eŭropa unuigo" en Milano, Italio, en oktobro.

● **Literaturo:** La komitato de KLEG (Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj) decidis eldoni antologion de tradukita

japana postmilita literaturo kiel kontribuon al la Centjara Jubileo. La ĉefaj laborantoj estos Miyamoto Masao, Konisi Gaku kaj Odagiri Hideo.

● **Parlamentara agado:** De la 27a ĝis la 29a de oktobro okazis en Romo la nacia kunveno de italaj esperantistaj fervojistoj. Oni i.a. organizis debaton pri la eŭropa lingva problemoj kun ĉeesto de eŭropa parlamentano s-ro Sergio Ercini (Kristan-demokrata Partio) kaj d-ino Carla Pesciatini, respondeculo de la socialisma partio PSI pri lingvaj proble-

moj. Montriĝis, ke la nombro de horoj da Esperantaj radio-elsendoj pasintjare atingis novan rekordon. En 1983 dek unu stacioj en dek landoj disaŭdigis 4 220 programojn, kiuj daŭris 1 821,5 horojn. En 1984 dek stacioj en naŭ landoj disaŭdigis 4 400 elsendojn, kiuj daŭris 1 899 horojn. Kiam pli da stacioj malkovros la utilon de la Internacia Lingvo?

● **Turismo:** De majo agas Esperanto-centro en Jerusalemo. Krom informi kaj aranĝi kursojn, la centro volas funkcii kiel turisma informejo. Vizitontoj al la



● **Filmo:** Raportisto Roman Dobrzyński intervjuas en Esperanto unu el la infanoj de "Bona Espero" por sia originala televida filmo *Angulo de Bona Espero*, elsendita de Pola Televido je la 6a de novembro.

Post la originala *Hungara antologio* de 1933 nun fine aperis la nova, lukse bindita eldono de

Hungara antologio

Pli ol 200 literaturaj pecoj de la plej famaj hungaraj aŭtoroj. Kompilita kaj kun ampleksa enkonduko de Vilmos Benczik.

Eld. Corvina Kiadó, 1983. 448 p. 24 cm. Bindita kun kvar-kolora kovrilo. ISBN 963 13 1625 4.

Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam. Prezo: 57,00 (por Nederl. 59,85) gld., plus sendokostoj.

"Tiu ĉi nova *Hungara antologio* pluetendas... la gamon prezentitan en la unua, kaj same entuziasme ni voras ĝin..."

William Auld

urbo povas skribi al s-ro Jeremi Hen-rikson, Jekhezkel 41, 95 351 Jerusalema.

● **Universitatoj:** En la fakultato de humanismo de Universitato de Rosario, Argentino, la dekanato decidis starigi regulan libervolan kurson de Esperanto. La instruisto estas Enrique Kohei, kiu jam de ok jaroj instruas la lingvon en la sama fakultato. Por informi la studentaron oni prezentis 40-minutan aŭd-vidan programon pri la 66a Universala Kongreso en Brazilo. Oni raportas pri granda entuziasmo.

Persone

● **Bociort:** La 13an de oktobro pasintjare prof. Ignat Florian Bociort festis la 60an datrevenon de sia naskiĝo. Li estas la honora prezidanto de la oficiala Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko, kiun li estigis kaj kiu funkcias en Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. Dum la pasintaj dek kvin jaroj, kiel ano de la gvidantaro de universitataj, kulturaj kaj ĵurnalistaj forumoj, prof. Bociort iniciatis en Rumanio multnombrajn sciencajn kaj publikajn agadojn por Esperanto. Li kunaŭtoris kun siaj studentoj plurajn rumanlingvajn lernilojn de interlingvistiko kaj Esperanto, kaj laboras super granda rumana-Esperanto-rumana vortaro.

● **Nitobe:** Ekde la 1-a de novembro cirkulas en Japanio novaj monbiletoj. La nova purpura 5 000-ena bileto surhavas portreton de d-ro Nitobe Inazō (1862-1933). Kiel vica ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj de 1921 ĝis 1926 d-ro Nitobe sukcesis diskutigi Esperanto en la Ĝenerala Asembleo, spite al kontraŭstaro de Britio kaj Francio. La Ligo

fine akceptis la raporton, rekomendantan la enkondukon de Esperanto en ĝeneralan edukadon. D-ro Nitobe ricevis trafan kunlaboron de d-ro Edmond Privat de UEA.

● **Haszpra:** La gvidanto de Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto, prof. d-ro Ottó Haszpra, internacirenoma specialisto pri hidraŭliko, pasigas preskaŭ du monatojn en Japanio kaj Ĉinio. Li faras sciencajn prelegojn kaj studvojaĝon dum novembro en Japanio, kaj dum pli granda parto de decembro en Ĉinio. Antaŭ la ekvojaĝo prof. Haszpra kontaktis la landajn Esperanto-organizaĵojn Japana Esperanto-Instituto kaj Ĉina Esperanto-Ligo kaj disponigis parton de sia tempo ankaŭ por la movadaj bezonoj.

● **Lins:** Dum oktobro kaj novembro ĉi-jare, d-ro Ulrich Lins (FR Germanio) pasigis, pro profesia laboro, plurajn semajnojn en sud-orienta Azio. Almenaŭ

en Kathmandu, ĉefurbo de Nepalo, kaj en Kalkato (Hinda Unio), Lins renkontiĝis kun kelkaj lokaj esperantistoj kaj provis firmigi iliajn kontaktojn kun la internacia Esperanto-movado. Kiel konate, d-ro Lins ĉefredaktas por UEA la novan eldonon de *Enciklopedio de Esperanto*, kies aperon oni planas por 1987.

● **Waringhien:** Ĉe la Eldonejo Gabrielli tre baldaŭ aperos (ĝi jam estas presata) *La mezepoka periodo*, tradukvolumo de Gaston Waringhien, kiu tiel kompletigas sian grandan antologian kolekton sub la komuna titolo "Tra la parko de la franca poezio". En tiu kolekto jam pli frue aperis *La renesanca periodo* (1977), *La klasika periodo* (1980) kaj *La romantika periodo* (1982). La kvar libroj kune sendube estas la plej ampleksa poezia antologio de unu naciolingva literaturo, kiun ni havas en Esperanto. Estas grave noti, ke *La mezepoka periodo* estas la 40a volumo el la plumo de prof. Waringhien.

Oficiala Informilo

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Brazilo: S-ro Hilmar Ilton S. Ferreira.

DONACOJ 1984 (Gld.)

ĝis la 4a de decembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 12,05. Britio: B.W.G. Phillips 41,30. FR Germanio: H. Schindler 23,12. Meksikio: S-ino Julie Regal 133,80. Anonima heredaĵo: 1 550,68. Anonima donaco 10 000,00. Diversaj malgrandaj 15,00. Sumo 20 994,93.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: S-ino S. De Weerd 58,00. Finnlando: S-ino I.

Helsingius 128,88. FR Germanio: R. Terjung 30,00. Usono: D. Scholz 18,15. Anonime 2 000,00. Sumo 3 915,43.

ĜENERALA KASO: Britio: Ch. A. Field 16,60. FR Germanio: I. Pahnhenrich 10,15; E. Herlitze 30,48; B. Koch 11,28. Kanado: S-ino B. Salt 7 566,21. Nederlando: J.B. v.d.Lek 12,00. Anonime 2 000,00. Diversaj malgrandaj 13,89. Sumo 11 295,72.

JUBILEA JARO: Brazilo: Nacia Esperanto-Komisiono 500,00. FR Germanio: Helmar Frank 20,00. Kanado: S-ino B. Salt 1 261,03. Usono: Rochelle Grossman 332,50. Sumo 7 536,90.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: S-ino R. Paintner-Trumpp 451,06. Sumo 4 509,00.

POR RENOVIGO DE LA DOMO: Nederlando: S-ino J. Dunnewold-Ehrmann 20 000,00. Sumo 33 050,00.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA
PATRONOJ (minimуме \$100): FR Germanio: Bruno Vogelmann; Werner Heinrich. SUBTENANTOJ (minimуме \$25): Usono: Nancee Medrano. AMIKOJ (minimуме \$10): Svedio: Eugen Rytenberg; Henrik Karlsson. Usono: Prenda E. Cook.

PATRONOJ DE TEJO 1984
Hispanio: Enric Gimeno Palau.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Nekrologoj

E. WREFORD CHANDLER (1905-1984) mortis antaŭ kelka tempo en Sidnejo, Aŭstralio, kie li estis fakdelegito. Li de 1940 estis membro de UEA.

ALBERTO DÍAZ CHAPARTEGUI (1892-1984) forpasis la 22an de oktobro en Southampton, Britio. Li lernis Esperanton en 1908 kaj dum malfacila periodo prezidis Grupon Esperantistan de Bilbao, Hispanio.

JOSEPH S. GAVAN (1897-1984) mortis la 17an de septembro en Blackburn, Britio, kie li estis sekretario de la loka Esperanto-grupo kaj delegito de UEA.

DONALD HALL-SMITH forpasis la 9an de novembro en Leicester, Britio. Li estis dumviva membro de UEA.

ESTER KIRVESNIEMI mortis la 12an de julio en Tampere, Finnlando. Ŝi dum 32 jaroj estis membro de UEA.

JOSEF MRAZ (1895-1984) mortis antaŭ nelonge en Gallspach, Aŭstrio, kie li siatempe estis la vicdelegito.

YRJÖ RAUTIO (1895-1984) forpasis en aprilo en Turku, Finnlando, kie li estis fakdelegito. Li membris en UEA de 1945.

CLEMENTINA TRANQUE IGLESIAS mortis la 31an de julio en Valladolid, Hispanio, kie ŝi siatempe fondis la Esperanto-grupon "Fido kaj Espero". Ŝi estis dumviva membro de UEA.

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

17-jara lernanto de ekonomio deziras korespondi pri literaturo, elektrotekniko, muziko kaj kolekti bildkartojn. S-ro Iraj Panahi, Lakan, Shokr 12, 41456 Rasht, Irano.

Bruce kaj Judy Sherwood – nova adreso: Dept. of Physics, Carnegie-Mellon University, Pittsburgh, PA 15213, Usono; (oficeja tel. 412-578-2740).

Deziras korespondi kun la tuta mondo pri diversaj temoj f-ino Sibylle Bichler, Küfergasse 1, D-7902 Blaubeuren, FR Germanio.

Notu la kurzon de la stelo: En la n-a monato de 1985 cent steloj egalvaloros al $(90 + n/2)$ nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloru. Universala Ligo, Vosseveldlaan 16, NL-3768 GM Soest, Nederlando.

Leteresperon kun abunda ekspozicio pri Esperanto en liceo aranĝos komence de majo junulara Esperanto-grupo, kiu serĉas gekorespondantojn. Bonvolu sendi bele afrankitajn leterojn, bildkartojn, Esperanto-gazetojn ks. al la Esperanto-instruisto kaj lernejestro s-ro Czesław Baranowski, ul. Chopina 21a/4, Pl-75-576 Koszalin, Pollando.

Mi kompilas liston de nacilingvaj libroj, en kiuj aperas mencio pri Esperanto (ĉefe romanoj ks.). Bonvolu sendi detalojn: aŭtoro, titolo, eldonejo, eldondato, paĝo en la koncerna eldono – laŭeble kun fotokopio al s-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo.

Junulino 16-jara deziras korespondi kun la tuta mondo. Marinka Belan, Bijedića 2 C, YU-47000 Karlovac, Jugoslavio.

Veran leteramikon precipe el Nederlando, Svedio aŭ Finnlando deziras trovi s-ino Lenke Szász (38j.), jud. Harghita 130, R-4174 Praid, Rumanio.

Dum aprilo ni aranĝos ekspozicion de infandesegnaĵoj pri la naturo (20 × 30cm); ĝis 14-jaraj. Esperanto-Grupo de Moià, Moià (Barcelona), Hispanio. Ĉiu infano ricevos donacon.

Anoncetoj

Fakaj asocioj: La temo de la Jarlibro de UEA en 1985 estos la faka kaj junulara agado. Se ekzistas fakaj asocioj internaciaj ne menciitaj en la Jarlibro, la organizantoj bv. proponi al la CO tekston de maksimume kvin preslinioj laŭ la modelo de ekzistantaj tekstoj de neligitaj fakaj asocioj. Oni bv. samtempe sendi pliajn informojn pri la asocio.

Pli da korespondantoj (precipe el Nederlando, Belgio kaj Svislando) deziras Hiag Ekanga 1-er, s/c M. Bell Jacques, B.P. 1323, Douala, Kamerunio. Li estas lernanto ĉ. 20-jara kaj jam atingis bazan scipovon de Esperanto.

Bonvolu skribi al talenta nova esperantisto, 26-jara kuracisto, d-ro Akwasi Owasu Osei, Komfo Anokye Teaching Hospital, P.O. Box 1934, Kumasi, Gano. En julio 1984 li ricevis kelkajn etajn lernilojn de Esperanto kaj en septembro li skribis preskaŭ seneraran leteron, en kiu li petis korespondadresojn.

Kontakto en 1985! Aldonu vin al la pli ol 1 500 personoj en kontakto per *Kontakto*. La kotizperanto por UEA akceptos nun vian abonon en via nacia valuto. Kursgvidantoj petu de la CO informojn pri la kolektivaj abonoj; grandaj rabatoj (de 40% aŭ 60%), se vi prenas minimume 10 ekzemplerojn. Rapidu informiĝi por aldoniĝi al la abonantoj por la ses-numera jarkolekto!

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Jarlibro 1985: Anoncu en nia Jarlibro por alparoli pli ol 8 000 personojn! Peru komercan nemovadan anoncon kaj vi povas ricevi makleraĵon de 30%. Petu nun de la CO anoncmendilojn en Esperanto, la angla, franca, germana, hispana, nederlanda kaj portugala. Lokaj grupoj povas peti mendilon por diskonigi siajn kunvenlokon kaj -horon per anonceto. Limdato por ĉiuj mendoj estas la 31a de januaro 1985.

Internacia skisemajno en Norvegio de la 4a ĝis la 10a de marto 1985, okaze de Holmenkollen: internacia konkurso de skisaltado; skikursoj. S-ino Tamiko Kawakami-Nielsen, ĉe Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, Norvegio.

Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ la Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).

11.00-11.30 Pekino, 30.36m (9880 kHz), 19.87m (15100 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.67m (11685 kHz), 19.78m (15165 kHz).

15.30-15.55 Varsovio, 41.18m (7285 kHz), 31.01m (9675 kHz).

16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 30.10m (9965 kHz), 26.20m (11445 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22 (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.30-23.00 Pekino, 26.05m (11515 kHz), 19.23 (15600 kHz).

LUNDE

18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

20.30-20.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz).

MARDE

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

ĴAŬDE

06.00-06.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.00m (6250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740 kHz), 19.84m (15120 kHz).

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

SABATE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, Rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 230, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

DIMANĈE

05.45-05.57 Vieno, 50.46m (5945 kHz), 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 31.14m (9635 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

09.45-09.57 Vieno, 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 41.84m (7170 kHz).



20.00-20.10 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 86.5 MHz. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

22.00-22.15 Rio-de-Janeiro, 214m (1400 kHz). Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20051 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Tre multe da daŭraj aŭ ne-daŭraj aferoj povas helpi aŭ malhelpi la dissendadon de radiaj ondoj: vetero, sezono, parto de la tago, ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, speco de ricevilo ktp. Tial ne eblas certigi, ĉu oni sukcesos klare ricevi elsendojn en sia lando aŭ mond-parto. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj informoj:

a) Direktitaj ondoj. **Pekino**: 9880 kaj 15100 kHz al Japanio kaj Koreio; 11685 kaj 15165 kHz al Sudorienta Azio; 7470, 9965 kaj 11445 kHz al Eŭropo; 11515 kaj 15600 kHz al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko je la 20.00 h. **Vieno**: 5945 kaj 9635 kHz al okcidenta Nord-Ameriko.

b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub a) el **Berno, Romo, Varsovio, Vatikano, Vieno, Zagrebo**.

c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio-de-Janeiro, Sorocaba** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (M.F.).

Ne sufiĉas nur aŭskulti!

Esperantaj radioelsendoj estas (aŭ povus esti) la plej regula kontakto kun la parola lingvo por la plimulto de esperantistoj. Vi ja scias, ke pasintjare okazis 3 623 tiaj elsendoj, kiuj daŭris 1 555 horojn. Tio signifas, ke oni ĉiutage povas aŭskulti Esperanton per radio dum pli ol kvar horoj. Provu foje! Ĉiuj detaloj troviĝas en la ĉi-supra tabelo. Konsciu ankaŭ, ke tiuj elsendoj dependas de sia populareco ĉe la aŭskultantoj. Pro tio:

Skribu foje al radio-stacio!

ALVOKO AL INTERESITOJ: Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, legado-projekton, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH17 7LN;** aŭ, se ekster Eŭropo, al **P.O. Box 373, Boronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**



Estu en
kontakto
kun la
mondo!

Nia vigla revuo *Kontakto* estas en kontakto kun la mondo. Mondo de junaj ideoj. 6-foje jare ĝi aperas abunde ilustrita. La kotizperantoj de UEA nun akceptas vian abonon por 1985 en via nacia valuto. **Kursgvidantoj:** ĝia simpla lingvaĵo helpas al viaj lernantoj progresi, petu informojn pri kolektivaj abonoj! Jam pli ol 1 700 ekzempleroj dissendiĝas. Do, estu en *Kontakto*, kun la mondo.

Krimo kun laŭdoj



“Jaĥto veturas for...”, nova krimromano de Deck Dorval, sukcesis en kelkaj monatoj rikolti laŭdajn recenzojn ĉie en la Esperanto-literaturo:

- Kia krimromano! Rapidpafa rakontado per vigla lingvaĵo (Esperanto)
- Bela riĉigo de nia propra literaturo romana (Dialogo)
- Agatha Christie revenis sub nova pseŭdonimo! (Franca Esperantisto)

Eldonis: Flandra Esperanto-Ligo, 1984, 192p. Mendu ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte de la eldonejo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Prezo: 25,20 gld.

“Per *Kiuj semas plorante...* la Esperanta romano fariĝis pli riĉa. Estas aparte bonvena la primovada temo, delonge neglektita de niaj verkistoj.”

V. Benczik

Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, 1984.
107p. 21cm. ISBN 92 9017 029 8. Prezo: 15,00 gld.



Esperanto-Servo-Fako de Eksport-Kompanio ofertas:

1. VIZIT-KARTON: US\$ 6,50 por 100 pecoj
2. LETER-PAPERON: US\$ 6,00 por 100 folioj
(normala blanka, 21 × 29 cm)
3. KOVERTON: US\$ 7,50 por 100 kovertoj
(normala, blanka responda kovert)

Ĉiuj kun verda stelo kaj vorto “Esperanto”, kaj superpresotaj viaj nomo, adreso kaj telefon-numero. Menditaj varoj ekspeditaj per registrita aer-poŝta paketo en 2 semajnoj post ricevo de la pago.

Mendu de ESPERO ENTERPRISES, G.P.O. Box 11992, HONG KONG.



Koresponda
Servo
Mondskala
de UEA

Petu la novan informilon de: KSM, p/a R. Llorens, 121 bis,
BD. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

Ĉu vi konas la teron?

Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj

Altnivela enkonduko en la geologion, originale verkita de d-ro Endre Dudich. Li traktas en populariga maniero ĉiujn subbranĉojn de la geologio.

Ĉiun ĉapitron vivigas kaj klarigas abundaj figuroj kaj tabeloj.

"... tiuj, kiuj havas bazan konon de la natursciencoj, certe profitos multon el la libro. ... mi profunde rekomendas ĝin al tiuj, kiuj interesiĝas pri la baza terscienco kaj ĝia aplikado." J.M. Mabesoone.

Eld. Scienca Eldona Centro de UEA, 1983. 150p. (+68p. da anoncoj). 23cm. ISBN 963 571 080 1. Prezo: 12,00 gld. (plus sendokostoj.) Rabato de unu triono ĉe samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj.

ACTA INTERLINGUISTICA

**Scienca interlingvistika simpozio
prelegaro de**

V. Barandovska, M. Duc Goninaz, B. Golden, A. Golonka, B. Jędrzejczyk-Rokicka, Z. Kornicki, J. Leyk, F. Lo Jacomo, S. Revesz, R. Rokicki, G. Silber, F. Simmonet, T. Tyblewski kaj B. Wacha prezentitaj dum

**la 11a Scienca Interlingvistika Simpozio,
okazigita en Varsovio en 1983.**

Red. Ryszard Rokicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1984. 160p. 21cm. Prezo: 18,00 gld. (plus sendokostoj). Mendo ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

John Wells: *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Scienca analizo de la lingvistikaj aspektoj de Esperanto: fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj semantiko. Kun bibliografio kaj indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO
De 65 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 13,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (37 guldenoj; por Nederlando 38,65 gld.)

Mendo provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, E-28036 Madrid 16, Hispanujo
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska